La verketoj en ĉi tiu eldonaĵo
pro la proponoj de
Ferenczi Ildikó kaj **Baksa József,**
la geestroj de
Societo Julio Baghy, Szegeda Esperanto Rondo kaj
Sud-Ebenlanda Regionala Fondaĵo
estis represitaj

En ĉi tiu eldonaĵo ĉiuj hungaraj, japanaj, koreaj kaj ĉinaj nomoj aperas en siaj originalaj formoj, do la familia nomo troveblas unue kaj la persona nomo poste. Sekve de tio ekzemple la familia nomo de la aŭtoro estas Márkus kaj lia persona nomo estas Gábor. La ĉi tie represitaj verkoj estis rekonstruitaj de la originalaj verkoj, pere de perkomputila teksto-prilaboro. Dudás József kaj Hideg Sándor signife kontribuis al la gramatika korekto, la traduko de la aldonitaj tekstoj, la bildredaktado kaj la preseja preparlaboro kaj pro tio la aŭtoro sincere dankas. Cetere Hideg Sándor havis gravan rolon ankaŭ en la preparo de la orientazia studvojaĝo, ĉar li estis la kompetenta oficisto, kiu informis la aŭtoron pri tiu ebleco antaŭ 30 jaroj.

La aŭtoro dankas al la japanaj esperantistoj, kiuj enkondukis lin en la movadon kaj speciale dankas al la ĉefo de Verda Stelo Entrepreno, al
Waseda Yutaka san
pro la fakto, ke per sia stipendio li ebligis la studvojaĝon. Pro tio la aŭtoro dum sia tuta vivo ŝuldas sinceran dankon.

Komentojn kaj rimarkojn bonvolu sendi al la retadreso de la aŭtoro

dr.markus.gabor@gmail.com

La Centro por Japanaj Studoj en Nanzan Universitato en sudjapana urbo Nagoya, kie la aŭtoro kompletigis sian studprogramon je la komenco de la okdekaj jaroj.

警世恒言： “如果你作一年计划，请你播种！
如果你作十年计划，请你植树！
如果你作百年计划，请你育人！
如果你播种，你只能收一次谷。
如果你植树，你就可采十年果。
如果你育人，你就可百获其益。

库安·丘”

Moto: "*Se vi planas por unu jaro, ĵetu grajnon!*
Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!
Se vi planas por cent jaroj, instruu la popolon!
Se vi ĵetas grajnon, vi rikoltas unufoje.
Se vi plantas arbon, vi rikoltas dekfoje.
Se vi instruas la popolon, vi rikoltas centfoje."

Kuan Cu



Popularigu Esperanton por akceli amikecon inter diverslandaj popoloj kaj interŝanĝon de sciencoj kaj teknikoj!

Yang Bo
Konstanta komitatano de la Tutlanda Popola Kongreso
kaj eksministro de la Malpezindustria Ministerio

ANTAŬPAROLO

En nia lando, Hungario la multlingveco havas miljaran tradicion. Kvankam la plebo ĉiam parolis hungare, la oficiala lingvo de la lando ĝis la mezo de la 19-a jarcento estis la latina. Pro tio, ke la lando dum pluraj jarcentoj estis parto de la Habsburga imperio, ankaŭ la kono kaj la uzo de la germana lingvo estis ĝenerala en la publika vivo, eĉ la naciaj minoritatoj de la lando parolis en siaj lingvoj.

Nialande la instruado, kaj ene de tiu la lingvoinstruado ĉiam havis signifan rolon en la publika vivo, kaj danke al tio, niaj sciencistoj povis havi konstantan kontakton kun la spiritaj metiejoj de la okcidenta mondo. Dankeblas al tio, ke la lando, konsidere ties loĝantaron donis la plej multajn Nobel-premiitojn por la mondo.

Post la dua mondmilito la potencaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis, kaj la rusa lingvo estis devige lernenda. Ankaŭ la aŭtoro la rusan lingvon lernis en la bazlernejo, kaj en la gimnazio estis lernendaj la latina kaj la franca lingvoj, kaj en la universitato la des pli mondlingviĝantan anglan lernis. Poste por li eblis fini ankaŭ postdiploman programon en japana universitato, por kiu certigis stipendion japana institucio, kiu ligiĝis al la Esperanta Mondorganizo.

El la vidpunkto de internacia komunikado kompreneble en pli facila situacio estas tiuj homoj, kiuj havas unu el la mondlingvoj, kiel gepatran lingvon. Ekzemple por anglo aŭ franco sufiĉas lerni nur la lingvon de la alia nacio kaj jam tuj kapablas uzi la du plej gravajn laborlingvojn de la Eŭropa Unio. Laŭ mezuro en la membrolandoj de la Eŭropa Unio 38% de la plenkreskuloj kapablas paroli angle, kaj 14% germane aŭ france (almenaŭ la demanditoj respondis tiamaniere). 34% de la britoj diras, ke ili alproprigis alian lingvon. Cetere necesas rimarki, ke la lingvoscio havas multajn gradojn: estas homoj kiuj nur baznivele kapablas uzi lingvon kaj estas aliaj, kiuj en la nivelo de gepatra lingvo kapablas komunikiĝi. Krome, se iu iam ellernis lingvon sed poste ne uzas ĝin, sendube li perdas parton de sia lingvoscio dum kelkaj jaroj.

La nun vivanta junularo havas nekompareble pli multe da eblo vojaĝi eksterlanden por labori aŭ partopreni fakajn kaj sciencajn kunvenojn, ol la membroj de la pli maljunaj generacioj. Tiu fakto mem forte instigas la lingvolernadon eĉ en plenkreskula aĝo.

Ekde 2004 Hungario estas membro de la Eŭropa Unio. La plifortiĝantaj ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj kune kun la multaj aliaj rilatoj en diversaj terenoj vekas la deziron en multaj homoj por lerni fremdajn lingvojn. Sekve de tio pli kaj pli multaj homoj havas la deziron lerni novan lingvon aŭ plulerni jam antaŭe lernitan lingvon. Ankaŭ en la institucioj de la Eŭropa Unio (Konsilantaro, Komisiono, Kortumo, Kortumo de Aŭditoroj, ktp.) oni instigas la tie laborantojn plievoluigi ilian lingvoscion aŭ lerni pli novan lingvon.

Eble ŝajnas esti nekredebla, ke dum la lastaj jaroj oni jam anoncas kursojn por lerni ankaŭ hungaran kaj aliajn malgrandajn lingvojn (momente kun malgranda rezulto). Estas tiel, ĉar nuntempe jam ankaŭ en la centroj de la Unio estas bezonata lingvoscio de aliaj lingvoj krom la angla kaj la franca. La kialo estas, ke oficistoj el la diversaj servoj de la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj tre ofte vojaĝas al la membroŝtatoj kun la celo por prepari decidojn aŭ kontroli kaj aŭditi dokumentojn kaj la plejmulto de tiuj dokumentoj troveblas nur nacilingve (kaj tute ne en la oficialaj laborlingvoj de la Eŭropa Unio).

La aŭtoro de ĉi tiu publikaĵo, Márkus Gábor pro sia studado kaj laboro vojaĝadis en multaj lokoj tra la mondo de Tokio tra la araba mondo ĝis Novjorko (New York) kaj lia lingvoscio grave plifaciligis por li, ke li povu konstrui rektajn interpersonajn kontaktojn kun la homoj vivantaj en la vizititaj lokoj. Pere de tio li povis pli bone kaj pli profunde ekkoni la mondon, en kiu ni vivis je la fino de la dudeka jarcento kaj pri siaj travivaĵoj kaj spertoj li verkis diversajn gazetraportojn, studojn kaj eseojn en diversaj lingvoj.

En tiu ĉi publikaĵo estas kolektitaj kelkaj verkoj de la aŭtoro, en la lingvoj, en kiuj ili originale ekaperis, do: hungare, japane, ĉine, koree, angle, svede kaj esperante. Kuraĝigu tio ĉi la legantojn alproprigi krom la eŭropaj lingvoj ankaŭ la pli ekzotikajn ekstrem-

orientajn lingvojn kaj ankaŭ la interpopolan interkompreniĝon antaŭhelpi celitan Esperanton. Laŭ la ĉi tie publikigitaj verkoj ankaŭ tiu ĉi povas esti utila ilo por la evoluigo de la internaciaj sciencaj, kulturaj kaj ekonomiaj interrilatoj.

Ĉiam estas homoj, kiuj ellernas lingvon nur pro la beleco kaj intereseco de la lingvo kaj pro la eblo pli bone kompreni la vivon kaj la pensmanieron de la popoloj, kiuj uzas tiun lingvon kiel gepatran lingvon. Kiam tiuj homoj decidas ellerni novan lingvon, ili tute ne pensas pri la eblo, ke la nova lingvoscio povos alporti ankaŭ profiton por ili. Por ilustri tiun fenomenon mi rememoras veran dialogon. Mia brita kolego, kiu jam dum longaj jaroj vivis en Luksemburgo, decidis aliĝi al lingvokurso por lerni luksemburgan (Lëtzebuergesch) lingvon. Estas konate, ke tiu lingvo, kiu apartenas al la mosela franka dialekto de la germana lingvo, estiĝis unu el la oficialaj lingvoj de Luksemburgo nur en la jaro 1984. Pro la tro altaj kostoj oni samtempe rezignis deklari tiun lingvon kiel oficialan lingvon de la Eŭropa Unio, kaj estas interese, ke nur malpli, ol tri kvarono de la loĝantaro parolas tiun lingvon, kiuj vivas en la Luksemburga Duklando. Tiuj alilandanoj, kiuj ne intencas vivi dum sia tuta vivo en tiu lando, kutime ne ellernas tiun lingvon eĉ bazgrade. Pro tio mi demandis mian kolegon, kial li tamen decidis lerni la lingvon. Responde li, kiu jam ankaŭ germane kaj france bone parolis, jene diris: Akrigi la intelekton.



la unua hungara membro de la

Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj

ENKONDUKO

Se ni konsideras la nuntempan japanan pintteknologion kaj la amason da pintkvalitaj japanaj elektronikaj produktaĵoj kiuj inundas la tutan mondon, preskaŭ nekredeblas, ke eĉ ne tre antaŭlonge, la esprimo „*japana produktaĵo*" egalis al la sinonimo de varaĉaĵo en la tuta okcidenta mondo. Kvankam ŝokis dekmilionojn da japanoj sceno el antaŭmilita amerika filmo, en kiu la ĉefrolanto volis esti sinmurdinto, sed la pistolo ne malŝarĝiĝis. Ĉar kiam la aktoro eĉ plurfoje sensukcese provis malŝarĝigi sian armilon, legis la surskribitan tekston sur la armilo „Made in Japan" (Produktita en Japanio), kaj tiel kompreninte la kialon de sia fiasko, li seniluziiĝinte nur mansignis.

Vidinte la senĉesan fortiĝon de la japana eno (yen) kaj la altan vivnivelon kiu elformiĝis en la insulolando ankaŭ tion estas malfacile kredi, ke granda mizero estis en la lando post la milito. Tion Kikuĉi Makoto en sia verko „Japana elektroniko" (originale: "*Japanese Electronics*"), tiel priskribas, ke *„La malsatado iĝis vivoformo. La tuta lando estis tia, kiel la subnutrita infano rande de la malsat-morto*".

Kaj se fine de la unua jardeko de la 21-a jarcento ni ĉirkaŭrigardas en la hungara ĉefurbo, ni vidas, ke en la urbo nun estas pli da ĉinaj restoracioj ol hungaraj. Krome, la tekstiluzinaj, maŝinindustriaj kaj la konstrumaterial-uzinaj aĉeteblaj varoj en la vendejoj estas pli grandparte ankaŭ ĉinaj produktaĵoj, same, kiel en la plej multaj eŭropaj grandurboj. En tiaj cirkonstancoj ankaŭ tion estas malfacile kredi, ke apenaŭ tridek jarojn pli frue, eble eĉ unu ĉina restoracio ne estis en la urbo. Tiutempe ankoraŭ eĉ en Ĉinio estis subevoluinta la infrastrukturo, baraktis ĝia ekonomio kaj la lando estis malriĉa Azia lando, rande de la sudorienta parto de Azio.

Márkus Gábor tiutempe estis en Ekstrem-Oriento, kiam Japanio, rezulte de la rapida, postmilita progreso, ĝuste atingis Usonon, konsidere ties ekonomiajn rezultojn, kaj kiam Ĉinio rezulte de sia ekonomipolitika reform-programo ĝuste komencis sian nekredeble rapidan ekonomian progreson. Rezulte de tio nuntempe Ĉinio havas

tiel fortan financan rezervon, ke de tie oni financas (inter aliaj) ankaŭ la ekonomion de Usono. Antaŭ kelkaj monatoj ankaŭ la hungara ministroprezidanto Orbán Viktor tion diris al la ĉina ministroprezidantro kiu vizitis Budapeŝton, ke „*Hungario ricevis historian helpon de Ĉinio, kiam Ĉinio promesis, ke partoprenas en la financado de la pli fruaj jaroj grandparte ŝuldiĝinta hungara ekonomio*".

Márkus Gábor pri siaj spertoj kaj pri la rezultoj de siaj tiutempaj studvojaĝoj raportis proksimume en ducent prelegoj kaj en diverslingve skribitaj publikaĵoj. Nun ni pensas, ke multaj el ili ankaŭ hodiaŭ estas interesaj kaj aktualaj. Tial ni proponis, ke la liston de liaj publikaĵoj kaj parton de liaj pli fruaj skribaĵoj denove devus presigi.

Do en tiu eldonaĵo la pli frue aperintaj skribaĵoj estas parte selektitaj, kiuj aperis ofte en pluraj libroj, aŭ en gazetoj, ordinare eĉ en multaj lingvoj. La skribaĵoj en la unua parto de la eldonaĵo estas hungarlingvaj kaj en la dua parto la nehungarlingve aperintaj skribaĵoj troveblas. (Pro teknikaj kialoj krom la plena volumo por la nur hungare sciantoj kaj por la hungare nesciantoj tiuj ĉi eldonaĵpartoj ankaŭ aparte aperis.)

Krom la ekonomiaj, lingvistikaj, kulturaj, religiaj kaj sociografiaj konoj kiuj ekkoneblas el la skribaĵoj, ankaŭ tial ni pensis grava la aperigon de la eldonaĵo, ĉar tiuj ĉi skribaĵoj direktas la atenton ankaŭ pri la graveco de la lingvolernado. Krome ankaŭ tion bone ilustradas, ke por la eŭropaj homoj la lernado de la lingvoj de la najbaraj eŭropaj popoloj estas bezonata kaj utila, sed krom tio ankaŭ la ekzotikaj aziaj lingvoj grandmezure povas riĉigi la pensmanieron de la lingvojn lernantaj gejunuloj, same kiel ankaŭ iliajn sentan kaj pensan mondojn.

Dum la pasintaj jaroj en Hungario okazis longa diskutado pri tio, ke Esperanton ĉu devas konsideri viva lingvo aŭ morta. Kelkuloj opiniis, ke Esperanton oni devas konsideri samtiel morta lingvo kiel estas la pragreka, la latina aŭ la sanskrita. La skribaĵoj de Márkus Gábor donas klaran refuton de tiu opinio, ja koncerne liajn faksukcesojn ankaŭ tiuj komunikaĵoj ludis gravajn rolojn kiujn li

faris pere de tiu ĉi lingvo. Evidentiĝas el la skriboj de la verkisto, ke ankaŭ tiu ĉi lingvo estas perfekte taŭga por la eksplikoj de la abstraktaj sciencaj, ekonomiaj, religiaj kaj kulturaj temoj, krom la ĝeneralaj ĉiutagaj temoj.

Fine estas ankoraŭ vidpunkto, pro kiu ni konsideris grava la aperigon de tiu ĉi eldonaĵo. En Hungario ĉiujare multdekmiloj da studentoj ekzemeniĝas pri diversaj lingvoj, la plejmultuloj simple pro tio, ĉar nuntempe tio ĉi estas la kondiĉo de la akiro de la universitata diplomo. Poste multuloj, post la sukcesa lingvoekzameniĝo tuj ĉesas (pli precize eĉ ne komencas) la uzon de la alproprigita nova lingvo en iliaj fakaj agadoj.

El la ĉi tie publikigitaj skribaĵoj evidentiĝas, ke ne sufiĉas alproprigi unu-du fremdajn lingvojn, sed por atingi seriozajn fakajn sukcesojn, en la konkretaj fakaj laboroj necesas eĉ konstante uzi la diversajn lingvojn. Se ĉiuj jundiplomiĝintoj post la sukcesa lingvoekzameniĝo aktive komencus uzi la alproprigitajn fremdajn lingvojn, tiam fare de la evoluigo de siaj internaciaj rilatoj ili povus antaŭhelpi siajn proprajn fakajn antaŭeniĝojn, kaj samtempe ili povus kontribui ankaŭ al la pli efika progreso de siaj laborejoj kaj ankaŭ de la lando.

En la unua parto de la eldonaĵo ni trovas la raportaĵserion de Márkus Gábor pri lia japana studvojaĝo, kiu originale aperis en la hungarlingva gazeto „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo). Tion poste oni senŝanĝe republikigis en la gazeto „Geofizikai Híradó" (Geofizika Informilo) kaj mallongigite ankaŭ en pluraj industriaj kaj sindikataj eldonaĵoj. La skribaĵoj aperintaj en la raportaĵserio, laŭmozaike montras la pli interesajn epizodojn de la vivo de la japanoj, kiuj vivis (laŭ la japana tempokalkulo) fine de la epoko de „Ĉiela Harmonio". La titoloj de la skribaĵoj:

- Helpe de stipendio „Verda Stelo" en nagoja universitato
- La Granda Lernejo en la Sudaj Montetoj
- Bambudanco kaj dramoj en la sanktejo
- Rigardo malantaŭ la „Ĉielan Harmonion"
- Semajnfinaj invitoj kun tralandaj migradoj
- De la senlaboreco ĝis la kurioza psikoterapio

- Indianoj de Ekstremoriento
- Fleksiĝemo de la bambuo kaj la tao-filozofio

Post la socigrafi-karaktera artikolserio sekvas skribaĵoj kiuj estis publikigitaj en diversaj industriaj kaj sindikataj gazetoj. Ili temas pri specifaj simptomoj de la japana ekonomia vivo:

- Petrolkemia industrio en la lando de la ekonomia miraklo
- Komputiloj - ĉie
- Aŭtomatigo –fakedukado – efikeco
- Ĉiutagoj en ŝanĝiĝanta mondo

Post la japana studvojaĝo la verkisto ricevis multajn invitojn de diversaj universitatoj, sciencaj akademioj, kaj de ekonomikaj, informatikaj, kulturaj, religiaj kaj lingvistikaj institucioj, por ke li raportu pri siaj spertoj. Krome, oni ankaŭ demandis, ĉu laŭ li la rapida, postmilita japana ekonimia progreso povas esti modelo ankaŭ por aliaj landoj, aŭ ne. El tiuj prelegoj, pli precize el tiuj skribaĵoj kiuj okupiĝas pri tiuj temoj, en la sekva parto de la eldonaĵo ni enmetis la raportaĵserion pri la ĉina prelegvojaĝo de la aŭtoro ĉar kaj en Eŭropo, kaj en Ĉinio tiu ĉi vekis la plej grandan interesiĝon. Ankaŭ tiujn verketojn oni reaperigis en pluraj eŭropaj gazetoj, en pluraj lingvoj. La titoloj de tiuj ĉi skribaĵoj:

- Energiobezono de miliardo da homoj
- Koreaj impresoj
- Alveno al Pekino
- La Fuŝuna Petrolkemia Akcia Societo
- La akademia konferenco
- Sude de la Kankra cirklo
- Kian koloron havas la kato?

Sekve tion en la skribaĵo „*La fono de la miraklo*”, kiu origine aperis en komputilteknika gazeto, la aŭtoro provas analizi kelkajn faktorojn de la rapida evoluo, kiun oni nomas japana ekonomia miraklo. Poste en la skribaĵo „*Nuntempaj mirakloj kaj sanktuloj*” tion prezentas, kiel kondukis specifa vivovojo el la iama Aŭstro-Hungara Monarĥio tra Orient-Azio ĝis Romo, la centro de la kristana mondo. Ankaŭ tiu

skribaĵo aperis en pluraj eldonaĵoj, unue en la gazeto „Mondpoŝto” kaj en la kalendaro „Niaj kulturo, tradicioj kaj festoj”.

En la fina parto de la unua parto – Anstataŭ epilogo – estas la verko „Arta tradukaĵo” de la senmorta hungara verkisto Karinthy Frigyes, iama prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo. Ties legado ĉefe por la hungaran kaj germanan lingvojn (kaj inkluzive la frakturon) gepatralingve konantoj donas eksterordinaran literaturan travivaĵon kaj neforgeseblajn amuzajn minutojn.

En la dua parto de la eldonaĵo troveblas la nehungarlingvaj skribaĵoj de la aŭtoro. El tiuj la unua skribaĵo, kies titolo estas „*Esperanta lernado en la tans-siberia ekspreso*”, temas pri tio, ke la aŭtoro kiel finlernis la internacian lingvon dum du semajnoj en la trans-siberia ekspreso, kiam de Budapeŝto li vojaĝis al Jokohamo, okaze de sia unua orient-azia turista vojo. Tiun ĉi skribaĵon Márkus Gábor pretigis pro nia peto. Antaŭ nelonge ni petis lin veni dum la somero al Kopenhago por partopreni lingvistikan kongreson, kaj rakonti, kial estis sence por li alproprigi krom pluraj eŭropaj kaj aziaj lingvoj ankaŭ Esperanton, la neŭtralan internacian lingvon.

Márkus Gábor dum sia unua ekstrem-orienta vojaĝo – parte ĝuste pro sia esperanta lingvoscio – ricevis eksterordinaran eblecon por pasigi kelkajn semajnojn en budhista monaĥejo. Tie li persone povis studi la ĉefajn dogmojn de la orienta religio, kiu determinas la vivon kaj pensmanieron de plurcentmilionoj da homoj.

Pri tiuj spertoj li raportas en la tri unuaj skribaĵoj de la dua parto de la eldonaĵo. Tiuj originale aperis japane, kaj la titoloj estas la sekvaj:

- Impresoj en la Kioto Monaĥejo
- „Tra la suferoj al la ĝojo”
- La viv- kaj pensmaniero de la okcidentaj kristanoj kaj la orientaj budhistoj

La titolo de la sekva skribaĵo donas la ĉeftitolon de la eldonaĵo, do la titolo de la skribaĵo estas: „*Ruĝa suno kaj verda stelo*” Tiun ĉi skribaĵon la aŭtoro same pro nia peto verkis por la kopenhaga lingvistika kongreso. En tio li resumis, kian pluson donis en lia vivo

la akiritaj fakaj kaj sciencaj konoj kaj kontaktoj en la „Lando de la Leviĝanta Suno”. Li detale klarigas, kiel li sukcesis (helpe de la internacia esperantista faka komunumo) konstrui larĝan internacian sciencan, kulturan kaj ekonomian interrilaton kaj konstrui larĝskalan internacian kunagadon en sia faktereno.

Ĉar la aŭtoro tiutempe ne per ŝtate garantiita grandsuma financa subvencio plenumis sian studprogramon en la universitato en Nagoja, tial ĉiutage li devis konfronti (foje hodiaŭ jam ŝajne nekompreneblajn) malfacilaĵojn kaj ankaŭ ordinarajn defiojn. Malsame al la tie studintaj usonaj gestudentoj en lia bankokonto ne aperis aŭtomate la unuan tagon de ĉiu monato granda sumo, el kiu la amerikaj studentoj facile povis lui loĝejon por si, kaj en eleganta apartiĝo de la loka socio ili povis sin vivteni ankaŭ en Japanio, kiel kutime en Usono.

Anstataŭ tio, oni lokigis lin en domon de la organizo, kiu donis al li la stipendion, Dum tiu tempo tie (kiel poste evidentiĝis, tiam jam nekuraceble malsana, kaj pro tio sufiĉe retiriĝema kaj ŝajne moroza) maljuna japano loĝis. Li eĉ sian nomon ne emis komuniki je la unua renkontiĝo al la enpaŝinta juna eksterlanda studento. Krom tio li malpermesis al li, ke li tro multe aerumu la ĉambron, tro multe uzu la akvon kaj la kurenton, eĉ la uzon de la telefono. (Eĉ tiam, kiam oni lin vokintus, do se tio estus senpaga.) Eĉ bizare, ankaŭ tion li malpermesis, ke li tie hungaran paperon uzu en la necesejo, dirinte, ke ĝi kompare al la japana estas tre malbonkvalita, ĉar estas tro dika…

Post kiam tiun ĉi konflikton la gvidanto de la organizo - kiu donis la stipendion -, eksciis, tiam li rapide eksigis de la firmao la maljunan, malsanan japanon kaj deklaris ke ankaŭ por la studento li ne certigos plu la stipendion, ĉar ambaŭ faris honton al la firmao. Tiuj amaraj spertoj motivis la aperigon de la sekva skribaĵo de la aŭtoro, kies titolo estas: „*Cent ormoneroj de la bienposedanto*”.

Tiu ĉi alegoria skribaĵo originale aperis en tokia gazeto en januaro de 1984, kun la titolo „*Ĉu li salutu antaŭe*?” kaj la subtitolo estis „*La japana manko de respekto al „homo”*. La verketo tiam ŝokis la japanan socion, sed tri jardekojn post la okazintaĵoj – pli bone

kompreninte la taoistan filozofion – hodiaŭ jam ankaŭ Márkus Gábor pensas, ke fare de pli toleremaj kondutoj estintus pli bone eviti la similajn konfliktojn.

La konflikto kun la maljuna japana homo apud la malagrablaĵoj donis ankaŭ multe da avantaĝoj por la aŭtoro. Li ja por eviti pliajn konfliktojn restis ĝis malfrua vespero en la universitato kaj nur post la malheliĝo iris hejmen por dormi al la hitocujama domo de la firmao. Tio ĉi donis por li la eblecon ke la lernmaterialon studu multe pli detale kaj tiel la ekzameniĝojn li povis kun bonega rezulto plenumi. Pro tio en la dua semestro li jam povis gajni ankaŭ la Nanzan Tomonokaj stipendion de la universitato, kiu parte kompensis la perdojn de la reprenita originala stipendio.

Pro tiu ĉi senmoneco malsimile al la aliaj eksterlandaj gestudentoj en la somera paŭzo li ne revojaĝis al Eŭropo. Anstataŭ tio li eluzis la situacion, ke la usonaj gestudentoj hejmenvojaĝis kaj plurloke (ĉe internacia komerca entrepreno, fremdlingva biblioteko, ktp.) partatempe li komencis instrui anglan lingvon. Estis interesa laboro por li en angla lingva kafejo (speciala klubo) kie li, kiel „English speaking host" vigligis la socian vivon. Tio ĉi pli frue estis la privilegio de la usonaj gestudentoj.

Finfine tiel li sukcesis plenumi la universitatan programon, por kio neatendite ankaŭ iu profesoro de la universitato donis grandan helpon. Tiu profesoro japane nomiĝis Julius Aburi, kaj ankaŭ la aŭtoro eĉ nur post monatoj eksciis, ke la originala nomo de la profesoro estis Ábri Gyula, kiu infanaĝe loĝis nur kelkajn kilometrojn for de la urbo Törökszentmiklós – urbo de la infanaĝa aŭtoro – en urbeto Kisújszállás.

Pri la profesoro preskaŭ neniu sciis en la universitato, ke li estas hungardevena, ja li post la finiĝo de la ĉina civila milito kun ankoraŭ vatikana pasporto alvenis al Japanio pere de la unua ŝipo, kiun oni permesis traveturi inter Tajvano kaj la patrolanda Ĉinio. Li tiam kiel juna katolika verbita monaĥo alvenis en Japanion kun la tasko, ke li reorganizu en Nagojo la supergradajn edukajn instituciojn kaj li estu la profesoro de la fundamenta teologio. Dum la japana studvojaĝa

periodo de la aŭtoro tiu profesoro estis la direktoro de la universitata biblioteko kaj li donacis multegajn librojn, vortarojn, magnetofonon, televidilon, ŝuojn, ktp. al la aŭtoro, kiam evidentiĝis, ke ili ambaŭ el la mezo de la hungara ebenaĵo transpasiĝis al la bordo de Pacifiko.

Tiel Márkus Gábor sukcese finis la universitatan programon kaj post la reveno al Eŭropo li komencis konigi la cirkonstancojn de la ekonomiaj sukcesoj de Japanio, kaj komencis popularigi la kulturon de la parenca popolo de Ekstrem-Oriento. (Laŭ certaj opinioj la hungara, finna, vogula /nun jam mansa/, ostjaka /nun jam ĥanta/, korea, mongola kaj la japana lingvoj estas en malproksimaj parencecoj unu de la alia, ĉar tiuj popoloj antaŭ plurmil jaroj vivis en la regiono de Ural-Altajo.)

Pri ĉi tiuj ekonomiaj demandoj temas la artikolo „*Japana ekonomio – Ĉu la miraklo imiteblas*?", kaj la „*Mistera japana skribsistemo*" tiun demandon analizas, ke la komplikaj – konsistantaj el plurmil signoj – ĉina kaj japana skribsistemoj kiujn avantaĝojn havas, pro kiuj eĉ nuntempe pli ol miliardo da homoj tiun skribsistemon uzas, spite de ties ĉiuj malfacilaĵoj.

Terene de la evoluigo de la orientaj-okcidentaj interrilatoj la plej grandajn rezultojn Márkus Gábor atingis sendube en la evoluigo de ĉina-hungara interrilato. En la jaro 1988 li invitis al Hungario profesoron Ŝen Ĉenru, poste en la Budapeŝta Ekonomikscienca Universitato superrigardinte la eblecojn de la evoluigo de la ekonomiaj interrilatoj, ili ambaŭ forveturis al Roterdamo, por ke tie per eŭropaj mezuroj pritaksu la eblecojn de la konstruado de ĉin-eŭropaj interrilatoj.

Poste helpe de la invito de la ĉina profesoro la aŭtoro forveturis al Pekino, kie por Ĉinio (kiu ĝuste pretis malfermi la pordegojn por la ekstera mondo) prezentis la tiamajn hungarajn reformcelojn kaj rezultojn kiel sekvindan modelon. Dum la konferenco, kiun organizis la Ĉina Scienca Akademio, kaj kiu estis aranĝita kun pli ol 1200 partoprenintoj, li atentigis pri la rolo de la instruado kaj pri la primera efiko de la teknika evoluigo al la ekonomia kreskado.

Lian mesaĝon oni bone komprenis kaj la ĉinoj konsideris tre aktuala. La organizintoj de la konferenco elektis lin en la prezidantaron de la konferenco kaj lian malferman mesaĝon, la tutan tekston de lia prelego, kaj liajn pli gravajn konkludojn fine de la konferenco ili aperigis ĉinlingve en la gazeto „*Tutmonda Scienco kaj Tekniko*". Tiujn skribaĵojn ni republikigas en tiu ĉi eldonaĵo, kun la titoloj: „*Malferma mesaĝo de la Pekina Konferenco*", „*La hungara ekonomipolitika reformo"* kaj *„La rezultoj de la konferenco*",

Poste ni kompletigas kun la parolo „*Arboplantado en Pekino*" de **Ĉ**en Hao**ŝ**u –amaskomunikiĝa vicministro –, ankaŭ kiu mem citis la moton de la mesaĝo de Márkus Gábor (kiu samtempe estas moto ankaŭ de tiu ĉi eldonaĵo), nome „*Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon*". La vicministro en tiu ĉi parolo esprimis sian esperon, ke dum la konferenco vere sukcesos planti arbojn, kiuj poste verdiĝos kaj tiel faras la mondon pli bona kaj pli riĉa.

Nun, fine de la unua jardeko de la 21-a jarcento ni nam vidas, ke en tiuj jaroj en Ĉinio sukcesis planti ne nur arbojn, sed – simbole dirite – grandegajn arbarojn, ĉar ekde tiam Ĉinio denove pli emfazas la gravecon de la instruado, akcelis la teknikan evoluigon, sekve la ritmo de la ekonomia evoluo estas elstare alta, kompare eĉ ankaŭ internaciskale.

Por tiu sukceso grave kontribuis en la lando ankaŭ la enkonduko de la merkatekonomio. Post la konferenco oni invitis la aŭtoron, ke li veturu al Kantono kaj ankaŭ en la tiea Ĵinan Universitato li parolu pri tiuj proponoj. De tie poste oni veturigis lin ankaŭ al la Speciala Ekonomia Zono de Shenzhen, kie la ĉinoj klarigis, ke en tiu speciala zono ili ebligas la konstruon de la merkatekonomio kaj kuraĝigas ankaŭ la konstruojn de la eksterlandaj-ĉinaj miksaj entreprenoj por pli rapide evoluigi la ekonomion.

Tiam Márkus Gábor demandis la ĉinojn, se ili scias, ke la enkonduko de la kapitalismaj merkataj interrilatoj instigas la kreskon de la ekonomio, tiam ili kial limigas ĝin nur al la specialaj ekonomiaj zonoj, kial ili ne enkondukas tiujn en la tuta lando. Tiam la ĉinoj

embarasite respondis, ke la demando ne estas aktuala. Sed la ideo restis en la publika pensmaniero kaj baldaŭ efektiviĝis la proponoj.

Por la evoluigo de la ĉinaj-eksterlandaj miksaj entreprenoj kaj de la ĉinaj-eksterlandaj ekonomiaj interrilatoj Márkus Gábor kontribuis ankaŭ mem fare de siaj eŭropaj prelegvojaĝoj kaj publikaĵoj. Pri liaj spertoj koncerne la pekinan konferencon kaj pri la elkonstrueblaj novaj interrilatoj de la des pli malfermiĝanta Ĉinio, grandnombran skribaĵon publikigis en diversaj lingvoj en la plej granda hungara prikomputila gazeto, en la centra organo de la plej granda hungara industria organizo, en sindikataj gazetoj, ktp.

El tiuj skribaĵoj en tiu ĉi eldonaĵo ni enmetis la sekvajn artikolseriojn, kies titoloj estas: „*Grava scienca konferenco en Pekino*" kaj „*La malfermiĝanta Ĉinio*" - „*Novaj eblecoj en la orienta-okcidenta ekonomia kunagado*". Ĉi lasta skribaĵo havis eĉ viglan internacian resonon. Reaginte pri ĝi ekzemple belgaj fakuloj proponis ke necesus oficialigi la registro-sistemon de la elkonstruado de la interrilatoj ankaŭ esperante. Tion ĉi ankaŭ en Ĉinio oni konsideris laŭcela kaj la proponon oni publikigis ankaŭ ĉine en pekina gazeto, kiun en tiu ĉi eldonaĵo ni denove publikigas kun la titolo: „*Esperanto en la komerca kaj ekonomia amaskomunikiĝo*".

Rezulte de tiuj ĉi klopodoj elformiĝis dum la pasintaj 25 jaroj la situacio, ke la ĉinaj firmaoj akiris stabilajn poziciojn en Hungario kaj nun jam en la budapeŝtaj konstruadoj la laboristoj en ĉinaj ŝuoj, en ĉinaj vestoj, per ĉinaj laboriloj uzante tre multajn ĉinajn konstrumaterialojn kaj loĝejinstalaĵojn konstruas la novajn loĝdomojn. Eĉ estiĝis neatendita situacio, ke en Hungario, en mezeŭropa lando, kiu famas tra jarcentoj pri sia agrikulturo kaj inkluzive pri la kulturado de bulbo kaj ajlo, jam preskaŭ nur ĉinan ajlon eblas aĉeti dum la plej granda parto de la jaro.

Kiam Márkus Gábor proponis metodojn al Ĉinio en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento ke ili plirapidigu la ekonomian evoluon, tiam la ĉinoj volis lerni el la tiamaj hungaraj spertoj, sed nun, en la 21-a jarcento, jam ni, eŭropanoj devus lerni el la sukcesaj ĉinaj ekonomi-evoluigaj spertoj.

La aŭtoro ankaŭ en la eŭropaj landoj ofte faris diversajn prelegojn pri la evoluigaj eblecoj de la ekonomiaj interrilatoj inter Hungario kaj la pliaj eŭropaj landoj. Koncerne la prelegon kiun li faris en la Popolaltlernejo en la sveda urbo Karlskoga, oni publikigis artikolon pri lia prelego kun la titoloj: „*Behärskar sex utländska språk" kaj „Nu är profit inte ett fult ord…"* (*Post 40 jaroj – La profito jam ne plu estas fivorto…)* Rezulte de tio ankaŭ lin mem oni petis ke partoprenu en la fondo de entrepreno, kiu svedajn industriajn varojn eksportos al Hungario kaj estu la direktoro kaj negocparta posedanto de la entrepreno.

Kiam antaŭ kelkaj jaroj la ekonomika profesoro de la Seula Universitato So Gilsu emeritiĝis, tiukaze la universitato eldonis memorlibron kun la titolo: „*Homoj en Pura Lando*". En tio oni publikigis artikolon de Márkus Gábor en korea lingvo kun la titolo: „Dankon al korea profesoro". En tiu eseo la aŭtoro rememoris, ke dum la tempo de la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo profesoro So donis valorajn konsilojn en sia prelego en la Budapeŝta Universitato kaj la aŭtoro resumas, kiel li poste povis utiligi ilin en sia laboro.

La aŭtoro dum la lastaj jaroj de sia aktiva kariero plenumis diversajn gvidajn postenojn terene de la parlamentaj kontroladoj kaj aŭditadoj. En la brusela centro de Eŭropa Unio, kiel en moderna Babelo, li plurfoje estis partoprenanto de la komunikadaj defioj kiuj sekvis el la plurlingveco. Li estis unu el la ekonomikfakuloj, kiuj havis la eblecon studi la sud-eŭropan (tribunalkarakteran) kontrol kaj aŭdit sistemojn en Portugalio, la skandinavan (kie la funkcio apartenas al la agadsfero de la registaro) en Svedio, kaj la anglosaksan (kie la faktereno apartenas al la parlamenta agadsfero) en Britio. En tiu agado la aŭtoro uzis ĉefe la anglan lingvon kaj tiel li povis efike direkti la taskojn de la institucio-evoluigo, rilate al la kontrol kaj aŭdit sistemo de la hungara parlamentejo, kiu estis unu el la kondiĉoj por la lando aliĝi al la Eŭropa Unio. En tiu temo el liaj skribaĵoj ni aldonis al tiu ĉi kompilaĵo la originale anglalingve publikigitan disertaĵon kies titolo estas „*Atesto de fakturoj de EU agrarfondoj*", kiu ekaperis en la monatrevuo de la hungara Financministerio.

La lasta skribaĵo en ĉi tiu eldonaĵo esperante traktas la saman temon, kiun en la tri unuaj skribaĵoj li analizis japane, do la similecojn kaj diferencojn en la moralaj instruoj de kristanismo kaj budhismo.Tiun ĉi skribaĵon la aŭtoro preparis por sia kvara ekstrem-orienta vojaĝo, okazonta en januaro 2012, kiam en Koreio proksime al la Flava maro, en la centro de la Ŭon-budhismo, en urbo Iksan li resumos la rezultojn de siaj esploroj.

Niaj organizoj, kiuj proponis la aperigon de tiu ĉi eldonaĵo (do la Societo Baghy Gyula, la Szegeda Esperanto-Rondo kaj la Sudebenlanda Regionala Fondaĵo) havas la komunan celon, ke apogu la lingvo instruadon kaj la lernadon de lingvoj kaj per tio la evoluigon de la internaciaj sciencaj kaj kulturaj interrilatoj. Ni pensas, ke tra la kolektitaj skribaĵoj de Márkus Gábor bone evidentiĝas, ke en nia pli kaj pli internaciiĝinta mondo, kaj por la individuaj sukcesoj, kaj por la fakaj karieroj nepre estas bezonata la kono de kelkaj fremdaj lingvoj. Ni estas konvinkitaj, ke krom la eŭropaj lingvoj ankaŭ per la kono kaj uzo de la ekzotikaj ekstrem-orientaj lingvoj, kaj ankaŭ per Esperanto novaj mondoj povas malfermiĝi por la lingvojn parolantaj homoj. Per kompreno de tiuj lingvoj esceptaj eblecoj doniĝos kaj pri la graveco de tiuj eblecoj la nur gepatran lingvon uzantoj eĉ en siaj sonĝoj ne povas pensi.

En urbo Szeged, la 16-an de Oktobro en 2011

Ferenczi Ildikó kaj Baksa József



La aŭtoro kun profesoro Mizuno Yoshiaki antaŭ la Hungara Parlamentejo sur la bordo de la rivero Danubo

ESPERANTISTIĜO
EN LA TRANSSIBERIA TRAJNO

En ĉi tiu rakonto mi parolas pri kelkaj interesaj okazintaĵoj de mia vivo. Mi naskiĝis post la dua mondmilito en Hungario, kiu lando post la milito apartenis al la izolita komunisma mondo. Tiu parto de la mondo estis vere apartigita kaj fermita dum multaj jardekoj kaj ordinaraj homoj kutime ne rajtis kaj ne povis vojaĝi eksterlanden. En kelkaj landoj, ekz. en Orienta Germanio, Rumanio, Bulgario, ktp., kaj ankaŭ en Hungario en la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj oni tute ne povis ricevi pasporton por privatcelaj vizitoj al la kapitalismaj landoj.

Sed je la fino de la sepdekaj jaroj la ŝtata politiko en Hungario iomete ŝanĝiĝis. Tiam oni akceptis novajn regulojn en la estraro de la hungara komunisma partio. Tiam la komunisma partio rekte kontrolis la registaron en Hungario, same, kiel tio okazis ĉie en la komunisma mondo. La esenco de la tiamaj novaj reguloj estis, ke plejparto de la loĝantaro ricevis eblecon havi pasporton unufoje dum tri jaroj por vojaĝi eksterlanden, tamen ŝanĝi monon sen limitoj ne estis permesite. La hungaraj civitanoj tiam rajtis ŝangi hungaran monon nur en la valoro de 60 dolaroj dum la menciita tri jara tempo.

En ĉi tiuj cirkomstancoj tiam mi pensadis pri alilanda vojaĝo, sed sen mono tio tute ne ŝajnis esti facila entrepreno. Tiam kaj la salajroj kaj la prezoj en la komunisma mondo estis relative malaltaj kaj tiuj ambaŭ estis sufiĉe altaj en la aliaj landoj de la mondo. Mi pensis, ke Hungario estis mez-europa lando en la centro de la kontinento, do viziti aliajn eŭropajn landojn ne estas vere interesa. Mi supozis, ke ĉie en Eŭropo vivas similaj, blankaj homoj, la kulturaj tradiciaj estas ankaŭ similaj, same kiel religioj, preĝejoj, ktp. Sekve de tio mi pensis, ke se mi volas havi vere unikajn spertojn, mi devus vojaĝi al alia kontinento.

Rigardante la mondomapon, por mi, eŭropano Japanio ŝajnis esti interesa kaj iomete egzotika, sekve de tio nepre vizitinda lando. Vojaĝi tien ŝajnis esti relative simpla afero. Tiam jam ĉiutage funkciis la transsiberia trajno inter Moskvo kaj la Japana maro. Por

mi, ordinara hungaro, apartenanta al la komunisma mondo eblis aĉeti bileton por tiu trajno por hungara mono, ĉar en komerco inter komunismaj landoj ne estis devo pagi per dolaro. Kaj la aferon pli faciligis la fakto, ke inter soveta urbo Nakhodko kaj japana urbo Jokohamo funkiciis ankaŭ rusa ŝipo, por kio bileto ankaŭ aĉeteblis por hungara mono. Do restis nur unu tasko: trovi malmultekostan tranokteblecon.

Tiam mi renkontiĝis ie en budapeŝta strato kun kolego, kiu vizitis la saman universitaton kun mi. Mi informis lin pri mia vojaĝplano kaj li proponis al mi lernu internacian lingvon Esperanton. Li diris al mi, ke estas Pasporta Servo en la Esperanto mondo, per kiu oni povas senpage tranokti en multaj urboj de multaj landoj en la tuta mondo. Do, mi aĉetis libreton de Pasporta Servo, en kiŭ mi trovis vere egzotikan ejon en sudjapana urbo Kioto kie esperantistoj rajtis tranokti senpage dum du semajnoj. Tio estis gastodomo de budhisma monaĥejo, kie unu el la monaĥoj jam apartenis al la internacia Esperanto movado.

La ebleco viziti tiun lokon plaĉis al mi, sed mi ne kredis, ke tiu servo vere funkcias. Do mi ankoraŭ ne decidis komenci lerni la lingvon, ĉar mi ne sciis, ĉu la afero vere funkcios aŭ ne. Anstatau tio mi petis mian kolegon, ke li traduku mian leteron adresitan al la monaĥejo en kiu mi demandis: ĉu ili vere akceptos min por studi japanan kulturon kaj budhisman doktrinon por du semajnoj. Kaj mi promesis al mia kolego, ke se mi ricevos pozitivan respondon, mi tuj komencos lerni la lingvon.

Post du semajnoj mi ricevis pozitivan respondon de la monaĥejo, dirante, ke oni volonte akceptos min, kaj ili estos feliĉaj enkonduki min en orientalistikon kaj en la japanan kulturon. Mi legis la leteron kun granda ĝojo, tamen mi denove ne komencis lerni la lingvon, ĉar mi estis ege okupita pro mia laboro kaj pro preparo por la vojaĝo. Tiel okazis, ke mi aĉetis du librojn de la fama Esperanto verkisto Julio Baghy: la unuan lernolibron, kaj la kortuŝan memorlibron de la verkisto pri siaj spertoj en siberia militkaptitejo, kies titolo estas “La Verda Koro”.

Mi aranĝis ĉiujn oficialajn aferojn hejme, kaj post kelkaj semajnoj mi envagoniĝis en Budapeŝto en la Tisza eksprestrajno, kiu funkciis inter Budapeŝto kaj Moskvo. Mi havis la planon ellerni la internacian lingvon dum la vojaĝado jene: La vojaĝtempo inter Budapeŝto kaj Moskvo estas du tagoj, inter Moskvo kaj Khabarovsko ses tagoj, inter Khabarovsko kaj Nakhodko du tagoj kaj inter Nakhodko kaj Jokohamo tri tagoj, do la vojaĝtempo entute estas dektri tagoj. Se mi lernas du lecionojn ĉiutage, tiel mi dum la vojaĝo povas ellerni la tutan lernolibron kaj kiam mi alvenos al Kioto mi flue povos paroli kun la lokaj esperantistoj en la internacia lingvo.

La komenco estis tre facila. En la unua leciono de la lernolibro mi trovis tre simplajn kaj facile lerneblajn vortojn kaj gramatikajn regulojn. Demandoj kaj respondoj jene:

“Kio vi estas? - Mi estas viro.
Kiu vi estas? – Mi estas Gabor Markus.
Kie vi loĝas? – Mi loĝas en Hungario.
Kio ĝi estas? – Ĝi estas domo.”

La sekvontaj lecionoj fariĝis poste pli kaj pli komplikaj, jene:

“Kia lando estas Hungario? – Hungario estas malgranda lando.
Ĉu Hungario estas lando aŭ kontinento? – Hungario estas lando kaj Eŭropo estas kontinento.
Kio estas pli granda, ol la alia? – Eŭropo estas pli granda, ol Hungario.”

Tiel mi bone ellernis la lecionojn unu post la alia kaj post kelkaj tagoj mi jam trovis multajn pli komplikajn kaj ne ofte uzatajn vortojn en la lernolibro, jene:

“Ni estas geknaboj kaj vivas en belega vilaĝo. Ni tre ŝatas vivi ĉi tie, ĉar estas ĉarma rivereto apud nia ŝatata vilagxo. Tie ni ofte ludas kaj foje-foje vizitas akvomueliston, kiu laboras en akvomuelejo ĉe la bordo de la rivereto. La akvomuelisto tre ŝatas la infanojn, ktp., ktp.”

Kiam mi legis tiun lecionon, mi pensadis pri tiu afero, rememorante, ke mi neniam vidis akvomueliston dum mia vivo. Mi tute ne povis imagi, kiel oni povas uzi tiujn vortojn en vera konversacio.

Cetere la trajno estis tre komforta, oni bone povis pasigi tempon en la trajnorestoracio dum la tuta tago, kaj estis kuŝejoj ĉie, kie oni povis bone dormi dum noktoj. La okcidentanoj uzis la nomon “big red train” por tiu trajno, kaj estis populara libro tiam aĉetebla en Ameriko kaj en Okcidenta Europo “The big red train ride”. En la okdekaj jaroj estis atraktiva turisma programo por okcidentanoj travojaĝi Siberion per tiu trajno.

Kiam nia trajno atingis Siberion, mi jam sufiĉe bone komprenis la internacian lingvon kaj komencis legi partojn de la fama libro de Julio Baghy, kies titolo estis “La Verda Koro”. En tiu libro la aŭtoro rakontas veran historion, parton de sia vivo, kiam li vivis en militkaptitejo en Siberio post la unua mondmilito. Estis kortuŝa legi kiajn malfacilaĵojn homoj travivis dum militaj jaroj kaj estis malfacile kredi, kion Baghy skribis, ke Esperanto donis esperon por kelkaj el ili, kiuj decidis organizi kaj partopreni Esperanto kurson en la militkaptitejo.

Por mi ekzemple, ŝajnis esti nekredebla la historio, kiun Baghy skribis pri iu esperantista japana militŝipkapitano, kiu invitis al sia militŝipo grupon de militkaptitoj, kiuj apartenis al Esperanto klubo en militkaptitejo. Ŝajnis esti nekredebla, ke iu invitas alilandajn nekonatulojn por babiladi kaj havi kafon kune kun manĝaĵoj dum militaj jaroj, nur pro la fakto, ke ambaŭ la invitanto kaj la invititoj apartenas al la sama lingvistika klubo kaj parolas la saman lingvon. Alivorte, inviti nekonatajn alilandanojn, ĉar ili estas samideanoj.

Kiam mi legis tiun libron en Siberio en la trajno, mi dubis kredi tiun historion. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke kvankam la historio ŝajnis esti tute nekredebla, tamen tio estis vero. Post kelkaj jaroj mi vizitis iun bibliotekon kaj arkivon en Budapeŝto, kie mi trovis la originalan poŝtkarton senditan de Julio Baghy el Vladivostoko kun la stampo de la japana militista cenzuroficisto. La aŭturo de la libro sendis tiun poŝtkarton al siaj europaj esperantistaj amikoj el militkaptitejo, kiam la japana esperantista militŝipkapitano invitis lin viziti sian militŝipon.

La dektrian tagon nia ŝipo, kiu nomiĝis “Bajkal” atingis la jokohaman havenon. Tie mi elŝipiĝis kaj kaptis trajnon al la malnova japana ĉefurbo, Kioto. La budisma monaĥo, kiu invitis min, promesis al mi per letero, ke li atendos min en la stacidomo, kune kun kelkaj japanaj esperantistoj. Do, mi preparis mallongan salutparolon en internacia lingvo kaj mi iomete ekscitiĝis, ĉar kvankam en la trajno mi povis legi dum la tuta tempo, sed tute ne havis eblecon kunparoli kun alia persono en Esperanto. Alivorte, mi tute ne havis rutinon en parolado.

Pro tio mi ne volis paroli kun la japanoj tro longe, ĉar mi timis, ke tiam, kiam mi parolos en internacia lingvo por la unua fojo en mia vivo, sen rutino mi ne povos kompreni, kion ili diros. Do, miaj salutvortoj estis la sekvontaj:

“Karaj Samideanoj! Mi tre ĝojas renkonti vin ĉi tie en Kioto. Mi estas hungaro kaj mi komencis lerni Esperanton antaŭ nelonge. Krome, mi jam vojaĝadas dum dektri tagoj kaj pro tio mi estas tre laca kaj ne povas plu paroli en Esperanto.”

Mi diris tiujn vortojn kaj la japanoj afable komencis alparoli al mi. Ili diris, ke ankaŭ ili estis komencantoj kaj mi surpriziĝis vidante, ke mi bone komprenis, kion ili diris. Poste ili invitis min promeni en la stratoj de Kioto kaj ni komencis konversacii tre simple, jene:

“Ĉu vi estas japano? – Jes, mi estas japano.
Kiu vi estas? – Mi estas Amiko.
Kio ĝi estas? – Ĝi estas lernejo.
Kio ĝi estas? – Ĝi estas restoracio...”

Post kelkaj similaj frazoj mi sentis, ke la konversacio estas tro simpla, do mi volis iomete vigligi la paroladon, kaj demandis jene:

“*Amiko, mi vidas tie domon. Ĉu ĝi estas akvomuelejo?”*

La japanoj ridetis, kaj klarigis al mi, ke tiu domo ne estis akvomuelejo, sed estis poŝtoficejo. Kaj diris, ke tiam jam ne plu funkciis akvomuelejoj, nek en Kioto, nek en la tuta lando. Responde mi informis ilin, ke en mia juneco mi vivis en belega vilaĝo. Mi aldonis, ke ni tre ŝatis vivi tie, ĉar estis ĉarma rivereto apud nia ŝatata

vilaĝo. Tie ni ofte ludis kun geknaboj kaj foje-foje vizitis akvomueliston, kiu laboris en akvomuelejo ĉe la bordo de la rivereto. Ni amuzis kiam tio okazis, ĉar la akvomuelisto tre ŝatis la infanojn...

La japanoj diris al mi, ke ili konkludis, ke mi estas modesta homo. Ĉar mi diris al ili, ke mi estas komencanto, kaj ne povas flue paroli en la internacia lingvo. Do, estis surprizo por ili, ke malgraŭ tio mi komencis paroli pri komplikaj teknikaj aferoj ne plu ekzistantaj en la moderna tempo.

- La ekonomian kreskon de iu lando determinas unuavice tio, ĉu la ekonomi-politiko instigas la laborulojn reteni sian produktadan potencialon, aŭ ĝuste male, al plia kaj plia fortostreĉo. Se la interes-orientiga sistemo ne premias la pli grandan fortostreĉon, tiam post pli-malpli mallonga tempo malrapidiĝos la kresko de la ekonomio. La japana socio estas forte "plenumo-centra" kaj konkurema: la plia produktado fundamentas kaj la pliriĉiĝon kaj la pliprestiĝiĝon. La plifortigo de la interesateco en la laboro povas efike pliaktivigi la agantojn de la ekonomio ankaŭ en aliaj landoj.

- Dum la pasintaj kvar jardekoj la Ministerio pri Internacia Komerco kaj Industrio de tempo al tempo alidirektis la nacian kapitalon al la plej progresaj branĉoj de la ekonomío. La ĝisnunajn sukcesojn de la japana ekonomi-direktada sistemo ebligis ankaŭ tiu ĉi permanenta struktur-noviga koncepto, realigita surbaze de analizoj pri la mondmerkataj tendencoj. La kreiva aplikado de tiu koncepto povus esti unu el la plej potencaj iloj por akceli la evoluon de landoj kun ekonomio malfermita al - kaj sin bazanta sur - la mondmerkato. Pluraj ekonomikistoj jam meze de la pasintajarcento verkis pri tio, kiel efikas sur la nacian ekonomion la evoluigo de progresaj branĉoj. Karl Marx skribis: "*Ekzistas niatempe kelkaj industri-branĉoj, kiuj regas super ĉiuj aliaj, kaj tiamaniere certigas la mondmerkatan superpotencon por tiuj popoloj, kiuj pleje praktikas ilin. Tiel ekzemple en la internacia komerco la kotono sola havas plian gravecon ol ĉiuj ceteraj materialoj kune, kiujn oni uzas en la produktado de vesto-varoj.*" Ĝuste laŭ la rekono de tiu teoria interrilato MIKI modernigis dum 40 jaroj la ekonomian strukturon tiel, ke la fokuso de la evoluigo grad-post-grade transiĝis de la tekstilaj industrioj unue al la petrol-kemia industrio, poste al la stal-produktado, ŝip-farado, telekomunika industrio, aŭto-fabrikado, kaj fine al la mikroelektroniko kaj aliaj pinto-teknikaj industrioj.

- Sekvante la principojn formulitajn en la antaŭa alineo, ni nepre devas konsideri ankaŭ la spertojn pri la institucia sistemo de la japana ekonomi-direktado. En la japana registaro la Ĉefministerio pri Ekonomio, t.e. MIKI, respondecas samtempe pri la kondiĉoj de la internacia komerco kaj de la industria evoluigo. Laŭ la japanaj spertoj

tiu organiza strukturo multe plifaciligas la ellaboradon de ekonomi-politiko konformiganta la ekonomian strukturon al la mondmerkataj postuloj kaj tiucele certiganta selektan evoluigon de la industrio.

- Se oni studas la japanan modelon de naci-ekonomia planado kaj de la kunordigado en la evoluigo de pinto-teknologiaj industrioj, oni renkontas pozitivajn spertojn pri la kunlaboro de la ŝtata ekonomi-direktado (MIKI, Ministerio pri Financoj, ktp.), sciencaj metiejoj (esplor-institutoj, universitataj katedroj ktp.) kaj grandaj industriaj entreprenoj. Laŭ japanaj spertoj la intensa partoprenigo de sciencaj teamoj en la ellaborado de ekonomi-politikaj gvidlinioj rezultigas science pli firme fundamentitan ekonomi-direktadon kaj - pere de tio- pli rapidan evoluon.

- Estas signife por la evoluo de la petrolkemia industrio, ke depost la t.n. "nafto-krizo" Japanio eĉ sian diplomatian agadon subordigas al la celo akiri la bezonatajn krud-materialojn kaj energion. (Tio motivas ekzemple ĝian neŭtralecon pri la milito iraka-irana.) Ŝajnas, ke ankaŭ tiu ĉi fakto estas instrua: por landoj celantaj pli ekvilibran kaj pli rapidan kreskon sendube estus pli facile certigi la necesajn kondiĉojn, se ili transformus sian diplomatian sistemon laŭ tiu ĉi vidpunkto (ekzemple per altigo de la nombro de ekspertoj pri komerco kaj ekonomio en la eksterlandaj reprezentejoj).

- Ellaborante la ekonomi-politikon, oni devas akordigi la kreskon kun la aliaj elementoj de la ekonomi-politika celaro: ekvilibro, stabila prez-sistemo kaj laŭebla evito de senlaboreco. Ĝuste la ekonomi-evoluigaj programoj ellaboritaj konforme al tiuj postuloj rezultigis, ke la rapidan ekonomian kreskon en Japanio ne paralelis grava senekvilibriĝo, kaj ke la prez-sistemo estas pli stabila kaj la senlaboreco malplia ol en la plejparto de la evoluinta industria landaro.

- Ne sufiĉas rekoni la celojn kaj eblojn. La direktistoj en ŝlosilaj pozicioj de la ekonomio devas konstante adaptiĝi al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. La ekonomi-politiko liveris la kondiĉojn por la sukceso, sed tiu realiĝis dank' al la kapablo de la ŝlosilaj figuroj de la japana komerca-ekonomia sfero.

- Ĉi tiu penso kondukas nin al la homaj faktoroj de la kresko. Ekonomikistoj ĉie en la mondo konsentas pri tio, ke inter la diversaj faktoroj de ekonomia kresko (laborforto, kapitalo, naturaj, geologiaj kondiĉoj, teknika progreso, investado, ktp.) pleje gravas la kreiva homo. La t.n. "investoj en la homan kapitalon", t.e. la elspezoj por altigi la kvaliton, la kulturan kaj fakan nivelojn de la laboruloj, ĉiam repagiĝas per pli efika produktado. Oni devas kompreneble zorge atenti pri la modernigo de la dungo-strukturo kaj posten-strukturo paralele kun la strukturo de faka kvalifikiteco. Ankaŭ la interes-orientiga sistemo devas efiki tiel, ke la financaj kaj intelektaj fortoj akcelu la kreskon. Tiu postulo validas precipe por la esplora-evoluiga agado, kiun oni povas fundamenti nur altigante la nivelon de faka instruado. Laŭ ĝenerala opinio ĝuste tiu ĉi agado estis unu el la plej gravaj rimedoj de la japana pinten-salto.

- La armadaj elspezoj en Japanio restis daŭre malaltaj, ili praktike neniam superis 1% de la malneta nacia produkto. Se ankaŭ en aliaj landoj oni povus malaltigi la armadajn elspezojn, tiam gigantaj financaj kaj intelektaj fortoj liberigus por la paca krea laboro.

- En la unuaj postmilitaj jaroj la ĝeneralan problemon de malabunda kapitalo oni mildigis per kreditoj kaj importado de funkcianta kapitalo*. Tiujn eksterajn fontojn Japanio uzis por teknika modernigo kaj struktura renovigo de la ekonomio. La lando tiel ne nur evitis la sorton de aliaj, paŝ-post-paŝe en ŝuldojn dronantaj aziaj landoj, kiuj iĝis defensivaj dependantoj de la mondmerkato, sed ĝi eĉ preparis la fundamenton por posta impetigo de la produktado. Post kelkaj jardekoj la situacio tute ŝanĝiĝis. Japanio fariĝis la plej granda kreditoro de la mondo, kaj kun la fortiĝinta eno ĝi pli kaj pli klopodas eksporti funkciantan kapitalon. Nun la landoj, kiuj importas japanan funkciantan kapitalon, ekhavas plusajn financajn fontojn, modernan teknikon kaj povas aliri la tutmondan retaron de la japanaj komercaj domoj*.

Pli vasta praktiko de la evoluintaj formoj de ekonomia kunlaboro (komunaj entreprenoj, kunlaboro en la produktado, kunlaboro sur la merkato de ceteraj landoj, ktp.) povas kontribui al pli ekvilibra kaj rapida evoluo de ambaŭ partneroj.

LA MISTIKA JAPANA SKRIBSISTEMO

En la numero 1984/1 de Internacia Komputado - post mia reveturo el stud-vojaĝo, farita en la mez-japana Nanzan Universitato - mi provis doni ĝeneralan bildon pri la aktuala situacio de komputil-industrio de tiu ĉi ekstrem-orienta lando.

Pri la tiamaj prognozoj intertempe jam evidentiĝis, ke ili estis realaj, eĉ en certaj komputilkategorioj la evolu-takto signife superis la planitan. Fine de la citita artikolo estis menciite sekvontfoje okupiĝi pri la problemaro de komputil-aplikoj.

La temo estas des pli aktuala en tiu ĉi numero, ĉar la priskribitaj rezultoj jam sukcese estas aplikataj en la instruado.



En la evoluintaj landoj - inter ili unuavice en Usono- la plej dinamike evoluinta tereno de komputil-aplikoj dum la lastaj jaroj estas la tekstoprilaboro. En tiu ĉi tereno lastatempe ankaŭ en Japanio sperteblas eksterordinare rapida evoluo. Sed la japana skrib-sistemo principe diferencas de la liter-baza skribsistemo de la okcidenta mondo, pro tio sub nocio de perkomputila tekstoprilabora sistemo oni devas laŭenhave tute alion kompreni en Japanio, ol en Eŭropo aŭ Ameriko.

Por konatiĝi kun la ĝisnunaj rezultoj de la tekstoprilaboro de la japana ideograma skribsistemo oni devas komence trarigardi tri temarojn.

- perkomputila storado kaj retrovo de ideogramaj skribaĵoj;
- nocio kaj funkciado de la japana tekstoprilaborilo ;

- metodoj por analizi teksto-strukturojn.

La japana skrib-maniero kaj ordigo

La japanoj importis la skribadon el Ĉinio en la 8a jarcento kaj tiam (kune kun la skribosignoj) ili transprenis ankaŭ ilian ĉinan elparoIon. Tiuj ĉin-devenaj vortoj poste enkonstruiĝis en la japanan lingvon, tiel hodiaŭ ĉiu tia skribosigno havas minimume du elparolformojn: unu ĉinan kaj unu japanan.

La ĉina elparolo de signo (l) ekzemple "tó", la japana „higaŝi". Ĝia signifo en ambaŭ kazoj estas oriento. La elparoloj de la signo (4) estas "mei" kaj "na".

Konvene al tio la elparolo de la signo-kombino (1,4) estas "tómei". Ĝi signifas la rapidan vojon inter (1,2) (Tokio, aŭ pli ĝuste elparolite Tókjó) kaj (4,6,5) (Nagoja). Sed se al la signoj de „tómei" oni aldonas ankoraŭ du signojn, la elparolo de la tiamaniere ricevita signo (1,4,6,5) estas .higaŝinagoja", kiu signifas Orienta Nagoja. El la ekzemplo bone videblas, ke dum la lernado de la japanaj skribosignoj necesas aparte lerni la elparolon de ilia kombino en kazo de ĉiu nocio, ĉar la eksterlandano, ne konanta detale la japanan lingvon, la signojn (1,4) povus legi kiel "tóna", ”tómei", „higaŝimei", aŭ "higaŝina”.

El semantika vidpunkto la plej grava karakterizo dc tiu ĉi skrib-sistemo estas, ke ĉiu ideogramo havas propran signifon. Ilia signo ofte estas facile rekonebla: ekzemp1e (3) signifas arbon, (7) arbareton kaj (8) arbaron. Tiuj (do ĉinaj kaj japanaj) skrib-sistemoj, konstruitaj ne el literoj nomiĝas ideogramaj skrib-sistemoj kaj la signoj mem japane „kanĝi”.

Krom la kanĝi-oj, havantaj propran signifon en la japana lingvo oni uzas ankaŭ fonetikan skrib-sistemon, eĉ du. Iliaj nomoj estas "hiragana" kaj "katakana". Diference de la eŭropaj skrib-sistemoj ili konsistas ne el literoj, sed el silaboj. Ekzistas 50 bazaj silaboj, el kiuj kaj el iliaj voĉaj ekvivalentoj kunmeteblas ĉiu ekzistanta japana vorto. Se oni ne povas aŭ ne volas skribi la japanajn vortojn per „kanĝi”-oj en la japanaj tekstoj, oni povas skribi ilin per hiragana

(ekz. afiksojn, derivilojn) kaj la fremdodevenajn vortojn per katakana. En la tabelo 1. ni prezentas japanan frazon, en kiu troveblas elementoj de ĉiuj tri signo-sistemoj.

Kiel el la ekzemplo videblas, la signoj de hiragana kaj katakana estas relative simplaj, sed kanĝi-oj estas sufiĉe komplikaj. El tiu mal-simpleco sekvas, ke tiujn signojn estas sufiĉe malfacile ordigi laŭ trarigardebla sistemo. Laŭ signifo ordigi ilin estas pli malfacile , ol la vortojn, konsistantajn el literoj de la latina aŭ cirila skribmaniero en la vortaroj, kunmetitaj laŭ la pricipo de la alfabeta ordigo. En la japanaj kaj ĉinaj vortaroj tiun ĉi problemon oni kutime solvas tiel, ke la kelkmilojn, eble kelkdekmilojn da skribo-signoj oni devenigas el 214 tiel nomataj radikoj, kaj laŭ ilia ordo oni vicigas en la vortaroj la vortojn: ĉiu skribo-signo estas aŭ mem radiko, aŭ dispartigeblas al tiuj partoj, unu el kiuj estas egala al iŭ el la 214 radikoj. Tiu signo-grupo, difinita laŭ iu radiko memkompreneble povas konsisti eĉ el kelkcent ideogramoj. Inter ili la pluan ordon difinas la nombro de la linioj, troviĝantaj en la ideogramo.

Storado kaj retrovo de ideogramoj

Videblas do, ke la retrovo de iu ideogramo en tiel nomata karaktro-vortaro estas sufiĉe longa, ja komence oni devas trovi la konvenan radikon. aliflanke ĉe ĉiu ideogramo oni devas aparte kalkuladi, el kiom da linioj ĝi konsistas. Por pli simpligi tiun relative komplikan sistemon de vortarado, la Viena Teknika Universitato ellaboris specifan metodon. La esenco de la metodo estas, ke la japanajn skribo-signojn oni kodas laŭ iliaj strukturaj karakterizoj kaj tiamaniere enkomputiligas. La ellaborantoj de la metodo longe analizis la japanajn ideogramojn, kaj konstatis, ke kvankam laŭ la unua rigardo la kelkmil signoj povas krei eksterordinare multnombrajn formojn, finfine ĉiu ideogramo laŭ sia struktura karakterizo estas envicigebla en 12 ĉefajn grupojn. Krom tio la esplorantoj de la universitato sukcesis ellabori logikan kodaron por sistemigi la ideogramojn laŭ la aper-formo de la signoj kaj iliaj aliaj karakterizoj.

Se la aplikantoj bone lernis tiun ĉi sistemon, surbaze de tio ili povas perkomputile retrovi la koncernan signon dum 3 sekundoj, ĝi aperas sur la ekrano kompreneble kune kun la elparol-maniero kaj ĝia germana signifo. La lernado de la apliko de la formo-rekona sistemo daŭras 1-2 semajnojn. Poste la lingvolernantoj aŭ la profesiaj tradukistoj - laŭ la ĝisnunaj spertoj - multe pli rapide povas traduki la japanajn tekstojn, ol uzante la tradician vortaron. Laŭ kelkaj kalkuloj per la nova metodo kun dudekono da laboro eblas fari pli precizajn tradukojn, ol tradicie.

Sed tiu ĉi sistemo nur plifaciligas la homan laboron, la laŭforman rekonon de la ideogramoj kaj la analizon de la gramatika strukturo de la frazo devas plenumi homo, relative bone konanta la japanan lingvon.

Japana tekstoprilaborilo

Do la eksterlandaj tradukistoj, intencantaj traduki japanajn tekstojn al aliaj lingvoj, jam povas pli facile retrovi ion el kelk-mila ideogramaro, sed paradokse tiu grandega kvanto de ideogramoj kaŭzas malfacilaĵojn ankaŭ por japanoj. Tiuj problemoj aperas ĉe la laboro de la tajpistoj, teksto-redaktistoj kaj presistoj, kiuj devas uzi plurmilojn da signoj de la trispeca skrib-sistemo. Tiun ĉi laboron solvas la tekstoprilaboraj programoj, kiuj kontribuas al la rapida retrovo el kelkmiloj da kanĝi-oj.

Kompreneble la tajpado kaj presado de tekstoj estus ege malrapida, se sur ia tradicia grandega tajpilo al ĉiu kanĝi respondus unu klavo kaj el ili oni devus retrovi la konvenan. La tekstoprilaboriloj, aperintaj antaŭ kelkaj jaroj - laŭamplekse la samaj, kiel la kutimaj literaj tajpiloj - perfekte solvis la problemon. Sur tiuj maŝinoj la klavaro estas iom pli riĉa, ol ĉe la latin-literaj lingvoj, ja ĝi esence nur enhavas la signojn, konvenajn al 50 bazaj silaboj (hiragana aŭ katakana). Kun tiu skribilo kunligiĝas vidigilo, sur kiu tuj aperas ĉiu kanĝi, konvena al la vorto, enigita per silabo-skribado. La kanĝi-oj estas retrovataj el storo tuj, dum malpli ol unu sekundo. El la kanĝi-oj, aperintaj sur la vidigilo per premo de unu klavo oni povas elekti la konvenan ekvivalenton per la latinlitera transskribo. Do per tiu

metodo oni sukcesis perfekte solvi la problemojn de la tajpado aŭ kompostado de japanaj tekstoj.

Tekstotradukado

En la pli kaj pli internaciiĝanta mondo de nia epoko estas necese, ke ni - por plirapidigi nian evoluon - kontinue sekvu la esplorrezultojn de aliaj landoj kaj senprokraste transprenu la utiligeblajn spertojn. La tiurilatajn intencojn ofte limigas la lingvaj baroj, pro tio en la lastaj jaroj pliintensiĝis la esploroj, celantaj la evoluigon de perkomputilaj sistemoj por tekstotradukado. Kvankam la elektronika stora kaj retrova sistemo de kanĝi-signoj, ellaborita en la Viena Teknika Universitato sendube plifaciligas la komprenon de japanaj sciencaj tekstoj kaj ilian tradukadon al eŭropaj lingvoj, tamen ĝi ne solvas la bazan problemon: la tradukon de kontinua teksto.

Se ni komparas la funkciadon de la japana tekstoprilaborilo kun la signo-retrovilo de la viena universitato, facile rimarkeblas, ke la du sistemoj solvas certagrade invers-direktan problemon. La tekstoprilaborilo post la fonetika entajpado retrovas la konvenan kanĝion, la viena sistemo post la enigo de kanĝi retrovas ĝian ĝustan elparolon (kaj samtempe ĝian signifon).

1. Tiu ĉi substantivo-finaĵo signifas, ke ĝia antaŭanta vorto estas la temo de la frazo, do pri la antaŭa afero ni demandas aŭ diras ion (ĝia signifo estas ĉirkaŭe: „Koncerne sinjoron Johnson. . .”
2. La finaĵo de loka adverba komplemento (sur, en)
3. La finaĵo de akuzativo (-n)
4. La kontinua prezenca finaĵo de la verboj en ĝentila formo

Tabelo 2

ジョンソンさんは名古屋大学で日本語を勉強していますか。	
Ĉu japane lernas sinjoro Johnson en la Nagoja Universitato?	1.
ジョンソンさんは名古屋大学で日本語を勉強していますから。	
Ĉar sinjoro Johnson en la Nagoja Universitato lernas japane. . .	2.

1. En la japana lingvo la demando esprimiĝas ne per la ŝanĝo de la vortordo, sed per demando-vorto
2. La vorto montranta al alia parto de la parolado klarigas la sencon de la frazo.

katakana	h.	h.	kanĝi		h.	kanĝi	h	kanĝi	h.		skrib-sistemo, h = hiragana
ジョンソン	さん	は	名古屋	大学	で	日本語	を	勉強	しています	○	kutima skrib-maniero
じょんそん	さん	は	なごや	だいがく	で	にほんご	を	べんきょう	しています	○	per hiragana
ĝonson	san	ùa	nagoja	dajgaku	de	nippon go	o	benkjoo	ŝiteimasu	.	elparolo (fonetike)
Johnson	sinjoro		nagoja	Universitato	en	japana lingvo	n	stud	as	.	signifo de la frazeroj
b	b	1.	b	b	2.	b b	3.	b	4		frazo-strukturo, b = baza vorto
Sinjoro Johnson en la Nagoja Universitato studas la japanan lingvon.											la signifo de la tuta frazo

Analizo de gramatikaj strukturoj

Esence alian problemon solvas la perkomputila tekstotradukilo, ellaborita en la angla Sheffield-a Universitato. Ĝi celas ne nur retrovi la anglan ekvivalenton de unuopaj japanaj vortoj, sed ankaŭ la tradukon de plenaj japanaj frazoj. Ĉar la aplikon de tiu ĉi metodo transprenis kelkaj aliaj universitatoj kaj inter 1982 kaj 1984 ankaŭ mi mem konatiĝis pli detale kun tiu ĉi metodo ĉe la Universitato Nanzan, sub gvidado de profesorino Ban Noriko, pro tio ankaŭ mi tiun ĉi metodon priskribas.

Kiel el la ekzemplo de la tabelo 1. videblas, la japana frazo konsistas el bazaj vortoj, skribitaj per kanĝi, hiragana kaj katakana, krom tio el finaĵoj de substantivoj, finaĵoj de verboj kaj deriviloj, skribitaj per hiragana. Por ke la signifo de la frazo estu komprenebla por persono, ne konanta la japanan lingvon aŭ por komputilo, okupiĝanta pri tekstoprilaboro, necesas du aferoj:

- koni la signifon de la bazaj vortoj kaj
- scipovi analizi la gramatikan strukturon de la frazo.

Por solvi la lastan taskon Jiri JELINEK ellaboris metodon, kiu aperis en 1974 en la eldono de la Sheffield-a Universitato: Japana-Angla Gramatika Vortaro. Ĝi tute ne similas al tradiciaj vortaroj. Ĝi enhavas nek eĉ unu signifon de bazaj vortoj, sed anstataŭ tio ĝi laŭ strikta logika sistemo vicigas senescepte ĉiujn gramatikajn strukturojn.

Surbaze dc tio tradukisto, konanta kaj aplikanta la metodon, sed neniel konante la japanan lingvon, kapablas perfekte kompreni kaj traduki anglen ajnan japanlingvan sciencan, politikan aŭ literaturan tekston. Por solvi la taskon ĝi bezonas tri rimedojn:

1. por trovi surbaze de kanĝi la signifon en japana-angla karaktra vortaro (aŭ kiel ni jam pli frue vidis, retrovilo de la viena universitato);
2. por trovi la bazajn vortojn, skribitajn per hiragana aŭ katakana en alfabeta japana-angla vortaro kaj fine
3. por analizi la gramatikajn strukturojn laŭ la jam menciita gramatika vonaro de Jiri Jelinek.

La aplikanto de la metodo - kiel ni jam diris pli frue - tute ne bezonas koni anticipe la japanan lingvon. Sufiĉas, se li povas distingi inter hiragana, katakana aŭ kanĝi-signoj. Krom tio li devas koni kaj absolute strikte sekvi la preskribojn de la menciita analiza sistemo.

En la japana lingvo la gramatikaj strukturoj, skribitaj per hiragana, plenumas tri gravajn funkciojn:

1. post la substantivo precizigas la signifon de la substantivo kiel frazo-parto;
2. post verbo difinas la tempon, modon, ktp. de la agado;
3. ili plenumas alian fraz-redaktadan funkcion (ekzemple signas, ĉu temas pri demanda, klariga aŭ alitipa frazo. En la tabelo 2. videblas tiurilata ekzemplo).

Konvene al tio la analiza sistemo de la gramatika strukturo konsistas el tri ĉefaj partoj: alfabete ordigita tabelo de finaĵoj de substantivo, simila tabelo de finaĵoj de verbo kaj listo de strukturaj elementoj, modifantaj la sencon de la frazo. Ĉiuj tri datumaroj enhavas en tiaj rikordoj la elementojn de la gramatika strukturo, en kiuj troviĝas ne nur la konkreta struktura elemento kaj ĝia signifo, sed ankaŭ tiurilata preskribo, kiamaniere necesas daŭrigi la analizon de la frazo-strukturo.

Laŭ tiu ĉi preskribo oni devas trovi la unuan signon aŭ signo-grupon de la frazo el unu de tradicie ordigitaj vortaroj, do ĉu el karaktro-vortaro, ĉu el laŭalfabeta fonetika vortaro. Poste la unuan signon de la ĝin sekvanta gramatika strukturo; se temas pri substantivo, tiam en la tabelo de finaĵoj de substantivoj, se pri verbo, tiam en tiu de finaĵoj de verboj. En la tiamaniere retrovita rikordo oni rigardas, kie kaj kiamaniere necesas serĉi plue la sekvan signon: ĉu en iu de la tradiciaj bazvortaj vortaroj, ĉu en tabelo de finaĵoj de substantivoj, ĉu en tabelo de finaĵoj de verboj, ĉu en frazoredaktaj gramatikaj struktur-elementoj.

Tiamaniere la analizo de la frazo-strukturo en tradukado fariĝas mekanika. Oni devas iri nur de maldekstre dekstren aŭ desupre malsupren kaj analizi ĉiun elementon de la signo-vico; eblas precize krei la tradukon de la japana teksto. La novaĵo de la priskribita

sistemo konsistas en tio, ke per tiu ĉi metodo eblas traduki ne nur la unuopajn vortojn de unu lingvo al la alia, sed eblas percepti la signifon de tutaj frazoj, kiel difinita sistemo, konsistanta el diversaj gramatikaj strukturoj.

Ĉar la struktura analizo konsistas el laŭvica apliko de tute mekanikaj reguloj, tio kreas la eblecon de la perkomputila prilaboro. La farendaĵo estas krei la jam menciitajn tri datumarojn kaj skribi programaron, kapablan konvene al preskriboj de la gramatika struktura-analiza sistemo, ellaborita en la Sheffield-a Universitato analizi ĉiujn eblajn signifojn de la laŭvice sekvantaj signoj.

En 1983 mi faris tiurilatan proponon en la Universitato Nanzan. Tiam komenciĝis tiudirekta laboro, al kiu alligiĝis ankaŭ profesoro pri matematiko de Universitato Kobe. Sed laŭ miaj scioj ĝis nun oni nenie povis ellabori sistemon kapablan kun centprocenta fidindeco traduki ajnan tekston de unu lingvo al la alia. Tio surbaze de la ĝisnunaj spertoj evidentiĝis.

En la sekvaj jaroj, jardekoj la komputiloj verŝajne pli profunde eniras en ĉiujn terenojn de la internacia komunikado kaj atendeble la esplorlaboroj por evoluigi perkomputilajn sistemojn de la tekstotradukado - por forigi la kreskantajn lingvajn barojn - rapidiĝos.

Profesoro Ábri Gyula grande helpis la studadon de la aŭtoro. Katsumori Hiroshi, vicprezidanto de Chubu Universitato invitis lin prelegi en sia universitato kaj Niwa Masahisa, prezidanto de Nagoja Esperanto Societo amikece enkondukis lin en la japanan socian vivon.

Tajpekzemploj:

(de la nova japana tajpilo)

Hiragana:

あいうえおかきくけこさしすせそたちつてと
なにぬねのはひふへほまみむめもやゆよ
らりるれろわをん、。

Katakana:

アイウエオカキクケコサシスセソタチツテト
ナニヌネノハヒフヘホマミムメモヤユヨ
ラリルレロワヲン、。

Rekte alireblaj kanji:

一二三四五六七八九十百千万都道府県市区郡町村字丁目
番地号様殿御中部課係億円昭和年月日時分々〃…ー

Aliaj ekzemploj:

英語は難しいです。= La angla estas malfacila.
エスペラントは易しいです。= Esperanto estas facila.

Ekzemploj el la Ĉina:

我門都是好朋友。Ni estas ĉiuj bonaj amikoj.
我是徳国人。 Mi estas Germano.
他是中国人。 Li estas Ĉino.

La aŭtoro kun Yamada Tempu, 82 jaraĝa hajku poeto

高博尔·马尔库什贺词

在世界语世界这样一次重要的科学会议上我诚挚地向大家问候。我来自遥远的欧洲国家匈牙利，在那里人们痛感语言隔绝之苦，正如在这里中国一样。在中国，语言问题的根源和国际交流的困难在于中国人使用独一无二的语言和特殊的书写方式，外国人无法阅读和理解。在匈牙利，匈牙利人也使用独一无二的源自亚洲的语言。欧洲其他国家的人也不可能理解。众所周知，匈牙利人几千年前生活在中亚西亚，因此，匈牙利语言的结构是亚洲类型的，与其他欧洲语言的结构绝然不同。

然而，尽管所有的语言都存在着学习上的困难，但是熟悉其他国家的研究成果，并以这种方式加速本国技术和经济的发展仍然是当今科学家的重要任务。我们认为国际语——世界语是解决世界上相互交往、联系最有效的工具。因此，我希望，本届国际科技会议获得巨大成就，并能给予与会者有关各国科学家最近研究成果的新的有价值的信息。

我祝愿大会获得成功，感谢大会组织者的热情准备，感谢中科院世协，并为之表示祝贺。

（施　展译）



Profesoro Shen Chenru kun la aŭtoro en Budapeŝto. Inter ili la filino de la aŭtoro.videblas en ĉina vestaĵo.

PEKINA KONFERENCKOMENCA MESAĜO

Mi sincere salutas vin ĉiujn en ĉi tiu grava scienca kunveno en la Esperanto-mondo. Mi venis el malproksima eŭropa lando Hungario, kie oni spertas problemon de lingva izoleco, same, kiel ĉi-tie en Ĉinio. La fundamento de lingva problemo kaj malfacilaĵo de internacia komunikado en Ĉinio estas, ke ĉinoj uzas unikan lingvon kaj specialan skribosistemon, kiun alilandanoj ne komprenas kaj ne povas legi. En Hungario la hungaroj uzas ankaŭ unikan aziodevenan lingvon, kiu ne estas komprenebla por aliaj eŭropanoj. Estas konate, ke hungaroj vivis antaŭ kelkmil jaroj en Centra Azio, kaj sekve de tio la strukturo de la hungara lingvo estas tipa azia kaj ne similas al la strukturo de aliaj eŭropaj lingvoj.

Tamen, malgraŭ ĉiuj lingvaj malfacilaĵoj estas grava tasko por la nuntempaj sciencistoj konatiĝi kun la rezultoj de aliaj landoj kaj plirapidigi tiamaniere la teknikan kaj ekonomian evoluon de siaj landoj. Ni opinias, ke internacia lingvo - Esperanto estas efika ilo por solvi la komunikacian problemon de la mondo. Pro tio mi esperas, ke ĉi-tiu internacia scienca konferenco rikoltos grandan rezulton, kaj donos novajn valorajn informojn pri la lastaj esplorrezultoj de diverslandaj sciencistoj.

Mi deziras bonan sukceson al la konferenco kaj dankas la entuziasman preparlaboron de la organizanto, do dankon kaj gratulon al la Scianca Teknikista Esperanto Asocio de Ĉina Akademio de Sciencoj.

陈昊苏贺词

应邀参加此次国际性的科技方面世界语的盛会，我表示热烈的祝贺。

从一八八七年柴门霍夫博士创立世界语以来，世界语已经有了自身一百年的辉煌历史。我曾经在今年上半年向世界语之友会提出，在第二个一百年开始之际，应该规划一下在更大的规模上推广世界语的远景。为此，我建议发起一个“世界语十年”的活动。按照我的设想，在这个世界语十年中，应该争取世界语者的数量有一个大的发展，还应该争取世界语的活动领域更加广泛。比如世界语应该深入到科学技术的领域里去，这当然就要依赖科技领域内的世界语者做出更大的努力。

我希望我们今天的这个集会，就是一个实际的进展。我相信各位是不会使我们失望的。

刚才我翻阅了本次会议的材料，其中有匈牙利的马尔库什博士一篇文章的题词：“如果你做十年计划，请你植树！”我希望我们现在所做的事，就是为这个世界多植绿色的树，使之与世界语的绿色之星相辉映，让我们的世界变得更美好！

ARBOPLANTADO EN LA ĈINA ĈEFURBO

Mi esprimas varman gratulon al la Internacia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, al kiu mi estis invitita partopreni.

Esperanto jam havas sian propran l00-jaran historion, de post 1887, kiam doktoro Zamenhof ĝin kreis. Mi jam prezentis mian proponon en la kunsido de "Amikoj de Esperanto" okazinta antaŭ duonjaro, t. e. en la komenco de la dua jarcento de Esperanto oni devas havi planon por disvastigi Esperanton en pli granda amplekso. Pri tio mi iniciatis movadon de "Dek Jaroj de Esperanto". Laŭ mia imago, la celo en tiuj jaroj estas, ke oni penu efektivigi grandan progreson de Esperanto ĉu en nombro de esperantistoj ĉu en ĝiaj agadkampoj. La enprofundigo de Esperanto en la sciencteknika kampo dependas de penado de esperantistoj en tiu kampo. Mi deziras, ke nia hodiaŭa renkontiĝo estu reala progreso. Mi kredas, ke vi ne malesperigos nin.

Mi ĵus foliumis la dokumentojn de la konferenco kaj trovis moton de doktoro Gábor Márkus en sia disertacio, ke "*Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!*" Mi esperas, ke la afero kiun ni nuntempe faras vere estos plantado de verdaj arboj por la mondo kun brilo de la verda stelo de Esperanto, tiel ke nia mondo fariĝos pli bela!

Chen Haoshu
Vicministro



技术发展在匈牙利经济改革政策中的作用

工业经济科学顾问
高博尔·马尔库什博士

警世恒言： “如果你作一年计划，请你播种！
如果你作十年计划，请你植树！
如果你作百年计划，请你育人！
如果你播种，你只能收一次谷。
如果你植树，你就可采十年果。
如果你育人，你就可百获其益。
库安·丘”

第二次世界大战结束后的40多年中，匈牙利的经济生活发生了巨大变化。经济发展的最主要成果是在六十年代和七十年代取得的，当时经济发展的方针比较灵活，国民经济发展得也比较快。这一时期取得的成果是国际上公认的。

1960年以后，国民收入增长三倍，工业生产的发展速度甚至更快，这段时间的农业生产也增长两倍。因此国民的实际收入和消费水平都得到了提高。此外，劳动条件、生活条件普遍获得改善。国家有效地解决了失业问题。因此可以说，由于这个时期的经济方针政策，人们成功地创造了比以往任何时候都好的社会和人民生活的安定局面。

而在近15年中，世界经济发生了根本的变化。因此，根据这一变化了的环境，在匈牙利建设社会主义社会和经济才成为可能。这就是说，有必要为国家的经济选择一条比以前更迅速、更有效地适应日益变化着的世界经济条件的新的发展道路。匈牙利社会主义工人党和政府领导人已经认识到这样的形势，并为解决这个问题在1987年下半年制订了新的经济改革纲领。

在这个政府纲领中，加速技术发展具有深远的意义和重要的作用。这个纲领的正式名称叫“经济和社会发展纲领”，它强调加速技术发展的必要性，因为政府认识到，在现在的国际市场上，如果商品不能体现当代科学技术革命的最新成果的话，那末就不能从出售商品中获益。

这就意味着，更新生产结构势在必行。这种更新就是匈牙利国民经济结构的现代化，必须在今后的几年中加以完善。这个工作纲领最基本的目标是：

—加速对集约化发展的适应性；

—提高对世界经济发展趋势的适应性；

—促进生产结构的现代化；

—加速技术发展；

—提高效益。

为了实现这个复杂的目标体制，需要全面推进经济改革进程的发展。应该了解，上述目标是不能孤立地进行分析的，它们之间有着各

种不同的相互关系。

我认为，在上面的各种目标中，加速技术开发是最重要的。这就是说，如果达到了这个目标，那末同时也就能够实现其他目标。例如技术开发必定促进新的现代化产品的研制，新的现代化产品在国际市场上就有竞争力，因此，如果人们能够明智而又合理地支援和加速技术开发，那就意味着，同时也有助于加速国民经济适应世界经济的发展趋势。

如果技术开发能促进产品成本的降低，那么，同样地，它也就意味着，依仗技术开发的成果，生产效益也能提高。因此，我确信，技术开发是经济发展中最重要的组成部分，它的效益比其他部分的效益持续的时间更长久些。

如果人们持有这种认识，那末就会得出结论：用于智力（教育、医疗服务等方面的）投资比以前人们所认为的要有更长远、更重要的效果。原因很简单，是不言而喻的：只有受过良好教育的劳动力才能把经济发展中的最重要的组成部分技术开发继向前进。

前美国经济学家协会主席 Theodore Schultz，在他作的关于美国对第三世界发展中国家援助项目的效益的总结结论时也有同样的认识。（请看Th. Schultz：在美国经济学家协会第七十届年会上有关智力投资部分的讲演）他证实，同样的美国生产设备在第三世界国家中所产生的效益要比在西方工业国家小得多。原因是：在第三世界的发展中国家里缺少受过教育的劳动力，而在西方工业国家里正是这些受过教育的人为在生产中有效地运用现代技术提供可能。

因此，如果高度发达的工业国家要想有效地帮助第三世界，只提供现代机器设备是不够的，更重要的是，要培训他们。

除上面提到的发展中国家的消极经验，还有一个正面经验能够支持我的主张。1982年和1984年，我在日本中部的南山大学时，曾在名古屋同来自20多个国家的大学生和教授一起分析了日本经济迅速发展的最重要因素，其结论同当地研究小组是一致的。这个所谓“日本经济奇迹”的最重要的因素就是日本技术的迅速开发，高等普及教育体制，持续地采用现代化技术，和生产的持续结构性的发展。

匈牙利的科学家们在各种专业性报刊上的长期讨论中也弄清楚了60年代技术革命的基本作用和人的因素在经济发展中的重要性。此后，在各类大学的教材和各地方政府和党的行动纲领中，从理论到实践都强调这个事实。

1987年通过的政府经济发展纲要深刻地、意义深远地阐述了这个问题。这个纲要规定，企业要根据高效益的技术进步成果提高自己产品的质量和技术水平。同时还必须发展同市场的联系，概括地说就是发挥市场作用。

就是说，现代的先进工业领域要比总的发展水平更快些。比如，在最近两年中，匈牙利总的工业发展速度是1.3—1.4%，同期运输工具制造工业发展速度为3.7%，电子工业为6—7%。但是根据计划，到1990年将占32%，现代的先进工业现在只占整个工业比重的28%。

为了达到政府提出的目标（为使经济结构现代化）对劳动岗位必须进行调整。随着工业结构的现代化，据研究和工会的分析，有十万人必须调整工作岗位。匈牙利工会对工业结构现代化的必要性是理解的，但决不允许在这个过程中出现失业。为了避免这种现象，有必要重新教育提高这一部分人的知识水平，使他们能够尽快在更有效的现代工业结构中的其他工作岗位进行有效的工作。

结论：当前匈牙利社会经济发展的政府纲领中，最重要的任务就是生产结构的现代化，加速技术开发。这是改善国家财经形势的条件，同时也是搞活未来生产的条件。为了给提高人民今后的生活水平创造安定的环境，必须完成以上任务。

徐婉芬译

HUNGARA EKONOMIA REFORMPOLITIKO

Moto: "*Se vi planas por unu jaro, ĵetu grajnon!*

Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!

Se vi planas por cent jaroj, instruu la popolon!

Se vi ĵetas grajnon, vi rikoltas unufoje.

Se vi plantas arbon, vi rikoltas dekfoje.

Se vi instruas la popolon, vi rikoltas centfoje."

Kuan Cu

Dum pli ol kvardek jaroj post la fino de la dua mondmilito okazis gravaj eventoj en la hungara ekonomia vivo. La plej gravajn rezultojn de ekonomia evoluo la lando atingis en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, kiam la ekonomiodirektado fariĝis pli elasta, kaj kiam la evoluo de popolekonomio plirapidiĝis. La rezultoj de tiu epoko estas konataj internacie.

Post 1960 la nacia enspezaro triobliĝis, kaj la evoluo de industria produktado estis eĉ pli rapida. La agrikultura produktado duobliĝis dum tiu tempo, kaj sekve de tio la konsumado kaj la realenspezo de la landanoj signifoplene plialtiĝis. Krome, la laborkondiĉoj kaj la ĝeneralaj vivkondiĉoj pliboniĝis, kaj la ŝtato efike solvis la problemon de senlaboreco. Pro tio oni povas atesti, ke sekve de la ekonomiodirekta politiko de tiu epoko oni sukcesis krei pli efikan socian vivosekurecon, ol iam ajn en la antaŭa historio de la lando.

Dum la lastaj 15 jaroj okazis fundamentaj ŝanĝoj en la mondekonomio. Pro tio sanĝiĝis la kondiĉoj, laŭ kiuj eblas konstrui la socialisman socion kaj ekonomion en Hungario. Tio signifas, ke necesas elekti novan evoluovojon por la landa ekonomio, kiu estas pli intensiva, ol la antaŭa, kaj kiu pli efike konformiĝas al ja ĉiam ŝanĝiĝantaj kondiĉoj de la mondekonomio. La estraro de Hungara

Socialisma Laborista Partio kaj la Registaro rekonis tiun situacion, kaj por solvi la problemon, ellaboris novan ekonomian reformprogramon en la dua jarduono de 1987.

En tiu registara programo la plirapidigo de teknika evoluo havas gravan kaj signifoplenan rolon. La programo, kies oficiala nomo estas "Programo por ekonomia kaj socia evoluo" emfazas la necesecon de plirapidigo de teknika evoluo, ĉar la registaro komprenis, ke en la nuna mondmerkato oni jam ne plu povas profitdone vendi varojn, kiuj ne enhavas 1a plej novajn rezultojn de niatempa scienca-teknika revolucio.

Tio signifas, ke nepre necesas ŝanĝi la strukturon de produktado. Tiu ŝanĝo estas la struktura modernigo de la hungara ŝtatekonomio, kiun oni devas kompletigi dum la venontaj kelkaj jaroj. La plej fundamentaj celoj de tiu laborprogramo estas:

- la plirapidigo de konformiĝo al intensiva evoluo,
- la plirapidigo de konformiĝo al mondekonomiaj tendencoj,
- la helpo de struktura modernigo,
- la plirapidigo de teknika evoluo, kaj
- la plibonigo de efikeco.

Por atingi tiun kompleksan celosistemon necesas vaste movi antaŭen la evoluon de ekonomia reformprocezo. Oni devas kompreni, ke la supremenciitaj celoj ne analizeblas separite, ĉar inter ili estas diversaj reciprokaj interrilatoj.

Mi asertas, ke inter la menciitaj celoj la plirapidigo de teknika evoluo estas la plej grava. Tio signifas, ke se ŝtato atingas tiun celon, tiam samtempe povas atingi ankaŭ aliajn. Ekzemple, teknika evoluigo devas akceli la evoluigon de novaj modernaj produktaĵoj, kiuj profitdone vendeblas en la mondmerkato. Sekve de tio, se oni inteligente kaj racie helpas la plirapidigon de teknika evoluo, tio signifas, ke oni samtempe helpas ankaŭ la plirapidigon de konformiĝo de ŝtatekonomio al la mondekonomiaj tendencoj.

Simile, se la teknika evoluigo akcelas la plimalgrandigon de

produktokostoj, tio signifas, ke laŭ la rezulto de teknika evoluo ankaŭ la efikeco pliboniĝas. Pro tio mi atestas, ke la teknika evoluo estas la plej grava komponento de ekonomia evoluo, kies efiko estas pli longdaŭra, ol la efiko de aliaj komponentoj.

Se oni komprenas tiun pensmanieron, tiam oni povas konkludi, ke la investo en homan kapitalon (instruado, medicina servo, ktp.) havas pli longdaŭran kaj gravan efikon ol oni antaŭe opiniis pri tio. La kialo estas tre simpla kaj memkomprenebla: nur la bone edukita laborforto povas movi antaŭen la teknikan evoluon, kiu estas la plej grava komponento de la ekonomia evoluo.

Theodore Schultz, iama prezidanto de Amerika Ekonomikista Asocio same opiniis, kiam li resumis la konkludojn de sia sperto rilate al la efikeco de amerikaj ŝtatprogramoj por helpi la evoluantajn landojn de la tria mondo. (Vidu Th. Schultz: Investment in Human Capital - prezidanta prelego en la 70-a jarasembleo de Amerika Ekonomikista Asocio.) Li konstatis, ke la efikeco de amerikaj produktiloj en la tria mondo estis pIi malgranda, ol la efikeco de la samaj produktiloj en okcidentaj industriaj landoj. La kialo: en la evoluantaj landoj de la tria mondo mankis la edukita laborforto, kiu en la okcidentaj industriaj landoj ebligis la efikan aplikon de moderna tekniko en produktado.

Sekve de tio: se la alte evoluintaj industriaj landoj volas efike helpi la trian mondon, ne necesas doni al ili nur la modernajn produktilojn. Instrui ilin estas eĉ pli grava afero.

Krom la supre menciita negativa sperto de la evoluantaj landoj, ankaŭ pozitiva sperto povas subteni mian tezon. Inter 1982 kaj 1984 mi en mezjapana Nanzan Universitato analizis la plej gravajn komponentojn de la rapida japana ekonomia evoluo en urbo Nagoya kune kun gestudentoj kaj gastprofesoroj el pli ol dudek landoj. La konkludo de la tiea studgrupo estis la sama: la plej grava komponento de la tielnomata "japana ekonomia miraklo" estas la rapida japana teknika evoluo, la altnivela ĝenerala eduka sistemo, la permanenta adoptiĝo de moderna tekniko, kaj la permanenta struktura evoluigo de produktado.

La fundamentan rolon de teknika evoluo kaj la gravecon de la homa komponento en la ekonomia evoluo en la sesdekaj jaroj klarigis en longa diskutado en diversaj fakĵurnaloj ankaŭ la hungaraj sciencistoj. Post tiu tempo oni emfazas tiun fakton kaj teorie en la diversaj universitataj studlibroj, kaj praktike en la diversaj registaraj kaj partiaj agadprogramoj.

En la nuna tempo la en 1987-a jaro akceptita registara ekonomia evoluprogramo profunde kaj signifece traktas tiun temon. La programo ordonas, ke la entreprenoj plialtigu la kvaliton kaj teknikan nivelon de siaj produktoj laŭ la rezultoj de pli efika teknika evoluigo. Krome, ankaŭ la merkatajn rilatojn, kaj ĝenerale, la rolon de merkato necesas plievoluigi.

Tio signifas, ke la modernaj progresivaj industriterenoj pli rapide evoluas, ol la ĝenerala nivelo. Dum la lastaj du jaroj ekzemple la rapideco de ĝenerala industria evoluo estis 1.3%~1.4% en Hungario, sed samtempe la sama figuro estis 3.7% en la transportiloprodukta industrio, kaj 6%-7% en elektroniko. La modernaj progresivaj industriterenoj havas nun 28% proporcion en la industrio ĝenerale, sed laŭ plano ili havos 32% proporcion en 1990.

Por atingi la registaran celon (por modernigi la ekonomiostrukturon) necesas, ke laborforto ŝanĝu laborlokon. Laŭ studoj kaj sindikataj analizoj centmil homoj devos ŝanĝi laborlokon sekve de tiu industria struktura modernigo. La hungaraj sindikatoj komprenas la necesecon de la industria struktura modernigo, sed tute ne akceptas la aperon de senlaboreco sekve de tiu procezo. Por eviti tion, necesas reeduki la menciitajn centmil homojn, por ke ili povu tuj pli efike labori en alia laborloko en pli efika industria strukturo.

Konkludo: La plej gravaj taskoj en la nuna hungara ekonomio kaj socioevolua registara programo estas la modernigo de produkta strukturo kaj la plirapidigo de teknika evoluigo. Tio estas la kondiĉo por la plibonigo de la financa situacio de la lando, kaj samtempe ankaŭ kondiĉo por la venonta vigligo de la produktado. Plenumi tiujn taskojn nepre necesas, por ke oni povu sekurigi la kondiĉojn por plialtigi la vivnivelon de la popolo en la venontaj jaroj.

高博尔·马尔库什
在闭幕式上的讲话

尊敬的代表们！

最近七天，在中国首都北京发生了举世瞩目的重大事件。来自各大洲众多国家的1400多位科学工作者聚会于此，在划分为六个专业组的范围内讨论了诸如数理化、地学、技术、经济、医学与生物、语言与教育等不同科学领域中的最重要的问题。

三周前在荷兰鹿特丹市召开了第73届国际世界语大会，其议题是："科学技术与人类的相互理解"*。在这届大会上，2300位代表一致强调国际语在科学和专业上的应用对于人与人之间更有效的了解是十分重要和必要的。

在第二次世界大战后的四十年间，几乎所有的荣获诺贝尔奖的经济学家都强调技术与经济发展之间相互关系的重要性。在这次学术会议上宣读的几篇论文也表明，世界上那些在经济发展上取得重大成就的国家，它们的技术发展也是最迅速的。

如果人们能迅速地了解其他国家科学家的最新成果，那么他们就能推进本国的技术发展，而这次国际科学会议确实有效地促成了国与国之间的科学交流。人们每天都能体会到，各国乃至各大洲之间的科学和贸易合作已经在这里开始了，这种合作有助于外国人更加真实地了解中国科学活动的现状。与此同时，这种合作也会有效地促进中国科学的发展，从而更有效地解决四化建设中的重大问题。

在这次会议即将结束之际，我已收到上百张新结识的中国朋友、著名的科学家和同行的名片。这可能是将来在科学和经济上开展有价值的合作的开端。我本人参加了地学和经济学分组讨论会。在此，我怀着极大的喜悦证实，特别是在经济学分组会上，与会者不仅宣读了论文，而且在某些论文宣读后进行了活跃的高水平的讨论。这充分体现出当今中国的开放政策和科学家们渴求了解新的科技信息的浓厚兴趣和强烈愿望。

下面是我在经济学分组会上宣读的那篇论文篇首引用的格言：

"一年之计，莫如树谷！
十年之计，莫如树木！
终身之计，莫如树人！
一树一获者，谷也。
一树十获者，木也。
一树百获者，人也。"**

而现在，在大会即将结束之时，我可以说：在整个会议期间，我们是在"树木"而非"树谷"，各国科学家彼此之间交流了经验和研究成果。因此，我们可以指望多获其益。而此时此刻绝非只是会议的结束，而且是未来富有成果的科学合作的开端。

* 对大会的议题似应作这样的理解：全力支持科学技术的进一步发展和普及，积极参加有助于人类相互理解的活动。简译为：支持科技发展，促进人类相互理解。——本刊编者

** 引自《管子·权修》——译者

（张大卫译）

KONFERENCAJ KONKLUDOJ

Dum la lastaj sep tagoj okazis grandioza, grava evento en la ĉina ĉefurbo -kunvenis pli, ol 1400 sciencistoj el multaj landoj kaj kontinentoj, kiuj en la kadro de ses sekcioj diskutis la plej gravajn problemojn de diversaj sciencterenо,j nome: 1. matematiko, fiziko

kaj kemio; 2. terscienco; 3. tekniko; 4. ekonomiko kaj komerco; 5. medicino kaj biologio; kaj 6. lingvistiko kaj edukado.

Antaŭ tri semajnoj okazis en nederlanda urbo Rotterdam la 73-a Universala Esperanto Kongreso. kies ĉeftemo estis: "Scienco kaj tekniko por la interhoma kompreno". Tie la 2300 kongresanoj unuvice emfazis la gravecon kaj necesecon de scienca kaj faka aplikado de la internacia lingvo por pli efika interhoma kompreno.

Dum la lastaj kvar jardekoj post la dua mondmilito preskaŭ ĉiuj Nobelpremiitaj ekonomikistoj emfazis la gravecon de reciprokaj interrilatoj inter la teknika kaj ekonomia evoluo. En ĉi-tiu konferenco ankaŭ evidentiĝis per kelkaj prelegoj, ke tiuj landoj de la mondo sukcesis atingi la plej grandan rezulton rilate al la ekonomia evoluo, kie la teknika evoluo estis la plej rapida.

Oni povas plirapidigi la teknikan evoluon, se oni rapide informiĝas pri la plej novaj rezultoj de aliaj sciencistoj, kaj ĉi-tiu internacia scienca konferenco vere efike helpis la internacian sciencan interŝanĝon. Oni povis sperti ĉiutage, ke internaciaj, eĉ interkontinentaj sciencaj kaj komercaj kunlaboroj komenciĝis ĉi-tie, kaj tio helpas la alilandanojn, reale informiĝi pri la nuna stato de ĉina scienca vivo. Kaj tio samtempe efike povas helpi ankaŭ la plirapidigon de la ĉina scienca evoluo, per kio la lando pli efike povos solvi la gravan problemon de la kvar modernigo.

Je la fino de la konferenco, nun mi havas pli ol cent nomkartojn de novaj ĉinaj amikoj, famaj sciencistoj kaj fakuloj en mia poŝo, kaj tio povas esti komenco de valora estonta scienca kaj ekonomia kunlaboro. Mi persone ĉeestis la grupokunvenojn de la terscienca kaj la ekonomikoscienca sekcioj. Mi kun granda ĝojo konstatis, ke ĉefe en la ekonomika sekcio oni ne nur legadis la prelegojn, sed okazis ankaŭ vigla kaj altnivela scienca diskutado post kelkaj prelegoj. Tio bone montras la malfermitecon de la nuna Ĉinio, kaj la intereson kaj scivolemon de la ĉinaj sciencistoj.

Je la komenco de mia prelego en la ekonomiko-scienca sekciokunsido mi uzis la moton:

"*Se vi planas por unu jaro, ĵetu grajnon!*

Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!

Se vi planas por cent jaroj, instruu la popolon!

Se vi ĵetas grajnon, vi rikoltas unufoje.

Se vi plantas arbon, vi rikoltas dekfoje.

Se vi instruas la popolon, vi rikoltas centfoje."

Kaj nun, je la fino de la konferenco mi povas diri, ke dum la konferenco ni ne grajnon ĵetis, sed arbon plantis, kaj reciproke informiĝis pri la spertoj kaj rezultoj de aliaj sciencistoj. Pro tio ni povas esperi, ke ni rikoltos multfoje, kaj ke nun estas ne nur la fino de konferenco, sed ankaŭ la komenco de fruktodonaj estontaj sciencaj kunlaboroj. (Beijing, 16 aŭgusto 1988)

Unu el la pitoreskaj ĉinaj vidindaĵoj kie harmonio kun la mondo kaj trankvileco sperteblas dum ĉiuj kvar sezonoj en la jaro

第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 1

Faktoj kaj esperoj

Dum la lastaj jardekoj Esperanto akiris pli kaj pli gravan rolon en la internaciaj sciencaj kontaktoj. Per la subvencio de la japana Entrepreno Verda Stelo kaj poste per la stipendio de Nanzan Tomonokai mi plenumis postuniversitatajn studon kaj esplorojn inter 1982-1984 en la Universitato Nanzan en urbo Nagoja (Japanio). La rezultojn de miaj esploroj mi resumis en doktora disertacio.

En miaj esploroj mi analizis la ĉefajn faktorojn de la procezo, kiu rezultigis, ke tiu ekstremorienta insullando dum kelkaj jardekoj post la dua mondmilito - unike en la mondo - pli ol centobligis la nominalan bruttan nacian produktaĵon, kaj ĝis 1968 tiel ĝi fariĝis la dua plej forta ekonomia potenco laŭ la ekonomiaj evoluinteco kaj povo; ĝin antaŭas nur Usono.

Spertante la japanajn ekonomievoluigajn sukcesojn, pli kaj pli multaj sudorient-aziaj landoj provis apliki certajn elementojn de la japana modelo por akceli la evoluritmon de sia ekonomio. La plej gravaj estas sur tiu kampo la rezultoj de Hongkongo, Tajvano, Sud-Koreio kaj Singapuro, nomataj en la internacia ekonomika fakliteraturo "la kvar tigroj". La pragmatisma ekonomipolitiko, signita per la nomo de Teng Hsiao Ping, volas ellevi Ĉinion ĝis la jarmilturno el la vico de la ekonomie postrestintaj landoj de la mondo.

Kun nova elano

En la unua periodo post la dua mondmilito la kontaktoj inter Ĉinio kaj Hungario evoluis multpromese. Sur pluraj kampoj hungaraj fakuloj helpis fruktodone la restarigon kaj evoluigon de la ĉina ekonomio, ekzemple la malkovron de la plej granda naftejo de Ĉinio partoprenis la inĝenieroj de la budapesta Geofizika Esplorentrepreno.

Poste tiuj kontaktoj signife refalis. Dum la jaroj de la kultura revolucio praktike ne ekzistis supera instruado en la lando kaj la

ekonomio malkombiniĝis. La eliro el tiu kaosa stato komenciĝis dum la okdekaj jaroj, kiam laŭ novaj principoj oni komencis reorganizi la ekonomian vivon de la lando kun kontinenta amplekso.

Ekde tiam en la tuta lando estas kuraĝigitaj la privataj entreprenoj, kaj estiĝis t. n. "speciala ekonomia zono" sur la suda apudmara teritorio, kie ili deziras absorbi la okcidentan pintan teknologion, altirante la eksterlandan kapitalon, kadre de ĉinaj-japanaj, ĉinaj-hongkongaj, ĉinaj-usonaj miksitaj entreprenoj.

La scienca esplorado estas nuntempe denove leviĝanta, sinsekve oni organizas sciencajn kenferencojn en la tuta lando, kaj multnombre oni sendas al Usono la talentajn ĉinajn gejunulojn.

Kvinono de la homaro

Eĉ en tiu serio estis elstare grava la 2a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto organizita de la Ĉina Scienca Akademio, okazinta en Pekino inter 10-16 de aŭgusto 1988, kiun partoprenis 1300 fakuloj el 20 landoj. La oficiala lingvo de la konferenco estis Esperanto.

La konferencon el Hungario partoprenis nur mi, kaj mi prezentis po unu prelegon en la sekcikunsidoj ekenomika kaj geologia. En tiu ĉi lasta sekcio estis prezentataj tre multaj teoriaj prelegoj pri la rezultoj de la plej novaj ĉinaj geologiaj kaj geofizikaj esploroj. En la 2a afro-azia regiona petrolkemia kaj esplora konferenco la ĉinaj geofizikistoj publikigis eĉ konkretajn praktikajn rezultojn: ili sukcesis malkovri metangas-kuŝejon kun supozeble dek bilionoj da kubometroj pere de la geofizikaj pritaksaj metodoj evoluigitaj de ili.

Tiuj fakaj rezultoj estas gravaj ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por Eŭropo, ĝenerale por la tuta okcidenta mondo. Ĉar ne povas esti indiferente por la mondo, ke unu miliardo de homoj, kvinono de la tuta loĝantaro de la tero, kiel povas certigi por si mem la bazmaterialojn kaj energiofontojn bezonatajn por pluevoluigi sian ekonomion.

La Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS) fondiĝis la 1an de novembro 1949, kiel tutlanda sciencorganiza kaj esplora centro por

natursciencoj. La akademio funkciigas 123 esplorinstitutojn en 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, krome pli ol 20 aliajn sciencajn organizaĵojn, kiel la Ĉinan Scienc-Teknikan Universitaton, bibliotekon, eldonejon, ktp. La nombro de la dungitoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj estas nunmomente 82.700, el kiuj 52.600 estas ekspertoj, alt- kaj mezgradaj sciencaj esploristoj kaj teknikaj ekspertoj.

Ankaŭ la internacia agado de ĈAS estas tre grava. Ekde 1978 ĝi establis daŭran, laŭkontraktan kunlaboron kun sciencaj akademioj, teknikaj sciencaj institucioj kaj universitatoj de kvin kontinentoj. Al la plifortigo de la internaciaj sciencaj kontaktoj signife kontribuas ankaŭ la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tial verdire mi neniam havis nesolveblajn komunikajn problemojn en Ĉinio, ja mi flue uzas Esperanton, krome dum la studado en Japanio mi ellernis grandan parton de la ĉinaj literoj.

Vizitkartojn!

Dum la 2a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto la kompreniĝon plifaciligis por mi, ke la prelegojn, prezentitajn kadre de la konferenco, la Ĉina Akademio de Sciencoj aperigis ankaŭ ĉine en sia trimonata revuo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj. La konferencon malfermis la prezidanto da la estraro de ĈAS, kaj la gravecon de la aranĝo analizis la telekomunika vicministro da la centra registaro. Kvankam la oficiala malfermo estis anoncita por la oka horo, la partoprenantoj kolektiĝis nur je la oka kaj duono.

Por eksterlandaj partoprenantoj, kutimiĝintaj al Eŭropaj sciencaj aranĝoj, estis strange, ke inter la prelegoj en la kunsidejo senĉese iris-venis homoj. Plej multaj el la partoprenantoj fotis la estraron kaj la aksterlandanojn, sed ankaŭ la estraranoj senĉese iris-venis. La prezidanto de la organiza komitato ekzemple ankaŭ min malkovris nur post la malfermo de la kunsido en la aŭskultantaro, kaj li venigis min pere de asistantino en la estraron. Tial tie ĉiu devis sidiĝi sur la najbaran seĝon.

La kunsido komenciĝis per laŭtega muziko de cimbaloj kaj tamburoj.

Kelkaj el la aŭskultantoj sidis vestitaj per soldataj uniformoj. La malferma parolo de la prezidanto estis interrompita plurajn fojojn per aplaŭdo. Por mi estis surprize, ke simplaj ĉinoj amase petis vizitkartojn de mi kaj de aliaj membroj de la estraro, kelkaj eĉ dum la oficiala malfermo venis tiucele al la estrara scenejo.

Komparoj banalaj

En la antaŭaj jaroj en Japanio mi plurajn fojojn partoprenis similajn aranĝojn, sekve mi havis eblon kompari la du ekstremorientajn landojn. La plej grava diferenco estas, ke en Japanio la homoj estas multe pli disciplinitaj. Mi memoras, kiam printempe de 1983 mi prezentis mian unuan japanlingvan prelegon en la Rotaria Klubo de Iĉinomija, la organizantoj petis min paroli ĉ. 6-8 minutojn. Kiam mi konsente kapjesis, ili redemandis, do mi parolos ĉu 6 aŭ 8 minutojn. Tiam mi diris ok minutojn, sed - ĉar tio estis mia unua japanlingva prelego - mi ne povis bone kalkuli la tempodaŭron, kaj la parolon mi finis post kvin kaj duonminutoj. Tiel mi sukcesis ekstreme embarasigi la organizantojn, kiuj ne povis abrupte kion komenci pri la tiel estiĝintaj du kaj duonminutoj.

En Ĉinio mi spertis ĉiutage, ke la realigo de la planoj povas malfrui ne nur minutojn sed horojn, eĉ tutajn tagojn. Post unu semajno mi jam ne estis surprizita, kiam iu firme promesigis min esti hejme sekvatage je la oka, ĉar li nepre volas paroli kun mi, kaj li sekvatage entute ne venis al mi. Estis aparte feliĉe, se hazarde mi renkontis lin je la dekunua en la parko de la universitato.

(Daŭrigota)



第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 2

En nia pasinta numero ni diskonigis iom el la abundaj ĉiniaj travivaĵoj. Nun ni turnu nian atenton al la aliaj ekstrem-orientaj landoj.

Koreaj impresoj

La organizado de peraviadilaj eksterlandaj vojaĝoj fariĝis iom komplikaj por hungaroj ekde kiam ili devas pagi 100% da imposto por ĉiuj aviadilbiletoj al socialismaj landoj. Tamen laŭ la nuna reglamento oni ne devas pagi tiun imposton se oni aĉetas tiujn biletojn eksterlande - do tiel la biletoj kostas nur duonon de la hungara prezo. Ankaŭ mi decidis unue iri al Bratislava en Ĉekoslovakio por aĉetí duonpreze la biletojn.

El Bratislava unue mi flugis al Moskvo, tie mi elektis la aviadilon de korea flugkompanio Chosonminhang. Post tutnokta laciga vojaĝo mi alvenis en Fenjano (Pyongyang). Tie en la aerodromo jam atendis min la ataŝeo de la tiea hungara ambasadorejo, kun kiu ni rekte aŭtis al la ambasadorejo, kie mi pasigis la nokton ĝis la sekvataga forvojaĝo.

Trafiknumero 216

Post la hungara gulaŝo kaj freŝiga bano mi decidis promeni iom en la urbo. La unua surprizo por mi - kiel verŝajne por ĉiuj eŭropanoj - estis, ke en la urbo ĉie svarmis soldatoj ka policanoj. Kvankam ĉe la ĉefaj vojkruciĝoj de Fenjano estis establitaj la trafiklum-aparatoj, tamen tiuj ne funkciis. La trafikon direktis junaj policaninoj perbrake. Estis surprize, ke ĉiuj aŭtomobiloj de la Centra Komitato de la komunista partio surhavis la trafiknumeron 216, ĉar la filo de Kim Ir Sen (Kim Il Sung) nomata kiel "nia estimata kaj amata Granda Gvidanto" naskiĝis en la 2a monato la 16an tagon. La policanoj rimarkante aŭton kun trafiknumero 216, tuj certigis por ĝi verdan vojon.

La plej granda surprizo por mi tamen estis, ke en la tuta urbo mi trovis eĉ ne unusolan manĝaĵvendejon. En Koreo funkcias rigora kuponsistemo, laŭ kiu koreanoj akiras la varojn por vivteno pere de siaj laborejoj kaj loĝloko. La averaĝa salajro estas iom malpli, ol 1000,- Ft (ĉ. 35 ned. gld. – la red.) sed gravan parton de tiu sumo koreanoj kutime redonas al la ŝtato. Kvankam vere, en la naskiĝtago de Kim Ir Sen, en tiu de lia filo, kaj eble ankoraŭ en du aliaj ŝtatfestoj ĉiuj civitanoj ricevas de la ŝtatestro iun donacon: viandon aŭ legomojn por unu kuiro, kompleton, ktp.

Stampoj kaj monbiletoj

Por eŭropanoj estas stranga, iom nekutima ankaŭ la korea monsistemo. En Koreo la oficiala valuto estas vono (won), la malpli granda monunuo estas ĉono (chon). Eksterlandanoj uzas stampitajn bankbiletojn, kiuj montras, ke tiu mono estas ŝanĝita kontraŭ eksterlanda valuto. La koloro de la stampo aludas ankaŭ pri tio, ĉu la monbileto estis ŝanĝita kontraŭ konvertebla (ruĝa) aŭ socialisma valuto (blua).

Tiu distingo estas videbla ankaŭ ĉe aluminiaj ĉonoj (koreaj fileroj). Kontraŭ konvertebla valuto oni donas ĉonojn kun du asteriskoj, kontraŭ socialisma kun unu; la fileroj uzataj de koreanoj tute ne surhavas asterikson. Eksterlandanoj rajtas uzi nur la markitajn monerojn, kvankam staras je ilia dispono nur unusola vendejo por akiri la bezonatajn manĝaĵon kaj teknikajn artiklojn.

Unuecaj prezoj eĉ en vonoj no ekzistas. Koreanoj rajtas aĉeti en la menciita vendejo nenion; kaj por la varoj eksterlandanoj devas pagi malsamajn prezojn depende de tio, kiukolora estas la stampo. En la manĝaĵsekcio sur la teretaĝo - kiu estas malpli bone provizita ol ajna hungara vilaĝa vendejo - inter la aĉetpovo de la duspecaj monbiletoj la diferenco estas ĉ. 20%. Sed en la teknika sekcio sur la dua etaĝo oni devas pagi sesoble pli per bluastampaj monbiletoj ol per ruĝastampaj. Koreanoj evidente ankaŭ ĉi tie povas aĉeti nenion kontraŭ sia mono.

Mi promenanta surstrate estis verŝajne tre okulfrapa, ja mi vidis neniun promenantan eksterlandanon krom mi en la urbo, kaj mi

rimarkis, ke la homoj nekaŝite spektadis min, precipe la infanoj tra la rompitaj fenestroj de aŭtobusoj. Tamen neniu alparolis min. El la antaŭaj konatoj mi renkontis nur unusolan: la cikadoj - konataj tre bone el miaj studentjaroj en Japanio - aŭdigis la saman orelŝiran bruon kiel dum la vesperoj en Tokio.

Ĉuĉeo kaj triumfarko

En la korea ĉefurbo cetere, malgraŭ la malriĉeco, videblas monstraj konstruaĵoj sur ambaŭ bordoj de la riverego trafluanta la urbon. Okaze de la sepdeka datreveno de la naskiĝo de prezidanto Kim Ir Sen estis konstruita pli granda kopio de la pariza triumfarko. Rekte sur la riverbordo altas ankaŭ la enorme granda monumento gloriganta la eternan ardadon de la ideo "ĉuĉe-o" ligita al la nomo de la prezidanto. Aliborde pozas statuto de Kim Ir Sen, pli ol 20 metrojn alta.

La ideo "ĉuĉe-o" deklaras memstarecon sur ĉiuj kampoj; kaj ĝia filozofia enhavo estas, ke homo estas reganta super ĉio. En la ekonomio tio signifas la ekspluatadon de la propraj fortoj, sur soldata kampo la sindefendon, en la politiko la teritorian suverenecon kaj sendependecon. Por studi tiujn kimirsen-an idearon certigas favorajn kondiĉojn la Palaco de Grandaj Popolaj Studoj.

Sed mi ne havis tempon por konatiĝi pli profunde kun la korea vivo, ĉar la sekvan tagon tagmeze mi pluvojaĝis al Pekino. La vagonaro kuregis tra monotonaj ebenejoj, videblis eĉ ne unusola fabriko aŭ uzino. En ĉiuj stacidomoj pendis la portreto de la prezidanto, kaj la apudfervojajn vilaĝojn ne eblis vidi, ja la maizoj ĉirkaŭ la domoj estis pli altaj ol la konstruaĵoj.

Ĉinio eksalute

Finfine vespere ĉirkaŭ la kvina mi ekvidis fumon de fabrikkamenoj trans grandega riverego Yalu, kies ponton trairante la vagonaro kuras plu jam sur ĉina tero al Pekino. La unua konstato estas - komparante kun koreanoj - la homoj en Ĉinio jam manĝas ion. En Koreo - kie ĉio okazas laŭ kuponsistemo - mi vidis eĉ ne unu manĝaĵvendejon, kaj jen: ĉi tie mi vidis tra la vagonfenestro grandajn melonamasojn.

Sur la perono de ĉiuj stacidomoj "atakas" la pasaĝerojn kolportistoj ofertantaj unupladajn manĝaĵojn en plastikaj skatoloj, dolĉaĵojn kaj senalkoholaĵojn. Unupladaĵo - konsistanta kutime el rizaĵo, legomaĵo kaj eble viandaĵo kaj ovaĵo - kostas unu kaj duon juanojn.

La ĉina monsistemo estas ekstreme komplika. Du specoj de mono cirkulas: renminbio (popola juano) kaj "feco", ricevita kontraŭ eksterlanda valuto. Tiu lasta prononcendas "efisi", ĉar ĝi estas mallongigo de „foreign exchange certificate" ('atesto pri monŝanĝo').

Laŭ la anglalingva teksto sur fecoj: 1 feco egalas 1 renminbion. En la praktiko la eksterlandanojn surstrate ĉiupaŝe alparolas ĉinoj proponante 60-70 procentojn pli por fecoj. En la plej granda magazeno de Pekino, en "Friendship Store" ('Butiko Amikeco') por filmrivelado oni devas malpli pagi per fecoj. En certaj lokoj tamen, ekz. en stacidomoj, hoteloj frekventataj de eksterlandanoj oni akceptas nur fecojn. Oficiale unu dolaro egalas cetere 3.6 juanojn.

La oficiala monunuo de la lando estas juano; 1 juano estas 10 ĵiaoj (nomataj en Pekino: maoj), 1 ĵiao estas 10 fenoj, do 1 juano estas 100 fenoj. Ĉar fenoj estas uzataj en du formoj: kiel bankbiletoj kaj kiel moneroj, montrantaj la valoron nur ĉinlitere, eksterlandano - almenaŭ komence - orientiĝas malfacile. Ankaŭ la bankbiletoj juanoj kaj ĵiaoj diferencas inter si laŭ la valoro kaj dependе de tio, ĉu temas pri malnovaj aŭ novaj moneroj.

Kiel pagi malpli?

La prezoj cetere - escepte hotelojn - estas en Ĉinio tre malaltaj. Dum la konferenco mi loĝis en universitata studenthejmo, tial mi ne devis elspezi multe. Tiel post la enpoŝigo de mia honorario por la prelegoj en ĈAS, por mi la plej granda problemo estis kontraŭ kio elspezi tiun amasegon de miaj popolaj juanoj. Por mi certigis ŝparadon ankaŭ, ke mi konas la ĉinajn literojn (ideogramojn) - ja antaŭe mi vizitis japanan universitaton - tiel mi spertis surprizite: en multaj lokoj, precipe on muzeoj, oni informis pri la enirprezo ĉine kaj angle. Kaj inter ili estis eĉ kelkfoje 200% da diferenco. Sekve plej ofte mi pagis la pli malaltan.

Por eŭropanoj estas surprizaj ankaŭ la prezoj. Brando kostas malpli ol biero, biero kostas malpli ol kolao. Duonlitra da 30%-a spicita brando kostis 1 juanon, la prezo de unu botelo da biero - depende de la speco - kostis inter 1.10-1.70. Skatoleto da kolao kostis 10-20 fenojn pli multe, sed ankaŭ simpla mineralakvo kostis pli ol brando.

La vagonaro kutime alvenas je la 10a matene en la Pekina stacidomo. La alvenon mi atendis trankvile, ĉar en alia sociscienca konferenco en Roterdamo, semajnon antaŭ mia vojaĝo al Ĉinio, mi renkontiĝis kun profesoro Shen Chenru, unu el la organizantoj de la konferenco. Li diris al mi, ke li reflugas el Roterdamo al Pekino rekte por prepari la akcepton de la alvenantaj konferencanoj. Li zorge surpaperigis miajn trajnonumeron kaj alventempon, kaj 1i promesis, ke min atendos du studentoj en la stacidomo.

Kiu min atendis?

Post la alveno de la vagonaro evidentiĝis, ke min atendas neniu. Kiel poste klariĝis, la du studentoj erarvagis kaj ne trovis la trajnon el Fenjano (kvankam el Fenjano venas ĉiutage nur unu vagonaro ...). Fidante al la promeso de mia profesoro, mi ja kunportis nek adresojn, nek telefonnumerojn, sekve mi staris senhelpa en planŝtopita stacidomego de metropolo kun 10 milionoj da loĝantoj. En la halo de la stacidomo kaj sur la placo antaŭ ĝi kuŝis homoj plurcentope sur la tero. Iuj dormis, aliaj manĝis aŭ paroladis atendante la vagonaron.

En Ĉinio la infrastruktura provizado estas katastrofa. Mankas telefonoj, mankas veturiloj; ofte okazas, se iu volas aĉeti bileton al Ŝanhajo, li ricevas la respondon, ke nur post du aŭ tri tagoj estos libera loko en la trajno. Ĝis tiam la malfeliĉa pasaĝero kuŝadas en la stacidomo. Tiajn malagrablaĵojn pro neorganiziteco mi spertis plurajn fojojn preskaŭ ĉiutage, sed mi ĝuis sufiĉan rekompencon per la unikaj dumkonferencaj ebloj science informiĝi kaj establi fakajn kontaktojn.

(Daŭrigota)

第二届国际世界语科技学术会议

GRAVA SCIENCA KONFERENCO EN PEKINO 3

Invitoj, invitoj, invitoj

Post la fino de la konferenco en Pekino, mi ricevis amasegon da invitoj de diversaj ĉinaj sociaj kaj sciencaj organizoj el multaj urboj de Ĉinio. Tamen pro la mallongeco de la tempo mi entreprenis plenumi nur unusolan inviton al Kantono, kien invitis min la Kantona Scienca kaj Teknika Asocio kaj la Universitato Jinan. S-ro Liu Weizhang, sekretario de la asocio proponis al mi loĝi en la asocia gastodomo, S-ro Fang Huiping, profesoro de la universitato, bonvenigis min en la boska studenta kvartalo, malproksime de la urba bruo.

La ekspresa trajno inter Pekino kaj Kantono faras la mil kilometran vojon dum 36 horoj, tiel trajnoj ekveturantaj vespere alvenas la trian matenon en la Sud-Ĉinia urbo. La litvagonoj estas - laŭ azia kutimo - malfermita, do sperteblas tre vigla societa vivo inter la ĉ. kvindek homoj vojaĝantaj en la sama vagono.

La pejzaĝo estas sufiĉe varia. Industriaj zonoj kaj rizkampoj altemas. Post Wuhan plioftiĝas freŝverdaj bambuaj boskoj, kaj ĉirkaŭ Kantono eblas vidi eĉ sovaĝajn bananarbarojn.

Ne plu surprizo

Alveninte en Kantono, unue mi provis renkonti en la stacidomo s-ron Liu Weizhang (post la ĝistiamaj spertoj mi ne surpriziĝis ne trovante lin - ja la vagonaro malfruis plurajn horojn, kaj li ĝuste tiam iris aĉeti matenmanĝon ...). Sekve mi provis telefoni al Fang Huiping en la universitato - evidentiĝis, ke ankaú telefonado ne estas tiel simpia. En Kantono mi ne trovis surstratan telefonaŭtomaton funkciantan per monero. Tamen finfine mi trovis aparaton, kiun funkciigis maljunulo en surstrata budo. La telefonkoston oni devis doni al li. Li cetere parolis nur ĉine. Mi jam eĉ tiam ne surpriziĝis, kiam post sensukcesa telefonado mi tamen devis pagi. Malhavante pli bonan solvon, mi

malkovris, ke buso n-ro 33 iras de la stacidomo rekte al Universitato Jinan, do mi enpremis min en la buson.

La buso estis neimageble plenŝtopita, tiom ke estis iuj, kiuj la malgrandajn infanojn endonis en la buson tra la fenestro, ĉar tra pordo maleblis jam eniri. En la universitato min akceptis amike Ke Shi De, vicestro de la Scienca Esplora Katedro, Fang Huiping, liaj edzino kaj filino. Ili diris, ke mi povos loĝi ankaŭ en la universitata gastodomo, sed - ja Ĉinio fariĝas pli kaj pli malfermita - estas eble, ke eksterlandanoj loĝu ĉe parencaj aŭ amikaj familioj, do ankaŭ ili mem tre ĝoje gastigos min.

En familia rondo

Mi akceptis tiun ĉi lastan eblon. En mia loĝĉambro estis japanaj televidilo kaj fridujo, kaj la lito estis ĉirkaŭita de retoj kontraŭ moskitoj. Tuj post la alveno mi estis invitita al tagmanĝo. Kantona specialaĵo: supo el porka intesto. Mi tamen preferis fruktojn, do mi aĉetis grandan ananason kaj du banangrapolojn de privata komercisto ĉe la universitata pordego.

Mia gastiganto devenas cetere el familio kun laboristmovada tradicio. Lia patro Fang Fang estis la tria plej altranga persono en la provinco, ja li estis la ĉefministro. La edzino mem estis interpretistino de la unua ĉefo, do de la soldatkomandanto. Ŝi kiel fama ĉina belulino foje dancis eĉ kun Chou Enlaj en iu akcepto.

Intertempe alvenis ankaú Liu Weizhang. Li jam preparis por mi viziton en Chunsan, kie mi havos la eblon konsultiĝi kun sukcesa distrikta vicpartisekretario pri la nuntempaj zorgoj kaj problemoj de la ĉina gvidantaro. Poste mi persone akiros spertojn en la speciala ekonomia zono.

La zono

La rapide evoluanta Sud-Ĉinia urbego Shenzhen situas en la najbaraĵo de Honkongo. Kiam post la erao de Mao Zedong, Teng Hsiao Ping eniris la potencon, li kiel pragmatisma politikisto konsideris sia plej grava tasko rapide evoluigi la ĉinan ekonomion. Por plenumi tiun celon oni denove donis rolon al la privataj

entreprenoj, kaj oni denove obeis al la merkataj leĝoj. Kadre de tiu plano estiĝis la marbordaj specialaj ekonomiaj zonoj, kie - esperante rapidan ekonomian evoluon - la registaro kuraĝigas ekfunkciigi ĉinajn-eksterlandajn komunajn entreprenojn. Kvankam okcidentaj ĉinologoj ne povis imagi la enkondukon de iuj elementoj de kapitalisma ekonomiorganizado en parto de la lando - tamen la tempo pruvis la pravon de Teng Hsiao Ping. Hodiaŭ Shenzhen estas metropolo kun nubskrapantoj kaj la vivnivelo pluroble superas la averaĝan vivnivelon de Ĉinio. Estas vere, ke Shenzhen estas rigardata de la ĉinoj kiel eksterlando, ja ili povas eniri tien nur kun speciala permeso.

Ankaŭ por multaj okcidentanoj estis surprizo la establo de la specialaj zonoj. Tamen estis pluraj, kiuj konsideris tiun ĉi paŝon nemalhavebla por la ĉina ekonomio. Armand Hammer, prezidanto de Occidental Petroleum, diris, ke Teng Hsiao Ping eĉ ne estis tiel kuraĝa en la ekonomipolitiko kiel Lenin estis en la dudekaj jaroj. Laŭ ĉefministro Chao Cejang la registaro intencas realigi du ĉefajn celojn: pliigon de la ĉina eksporto (aŭ importanstataŭigon) kaj absorbadon de la evoluinta eksterlanda teknologio.

Tempo estas mono

Elirinte el la klimatizita vagonaro Kantono-Shenzhen mi estis atendata de duopo: Du Shou He, ĉefinĝeniero de Shenzhen Special Economic Zone Development Co., kaj Lee Teck Shiu, direktoro de Espero Enterprises en Honkongo. Ĉar, malsame ol en aliaj partoj de Ĉinio, ĉi tie tempo estas mono, ni tuj aŭtis al la centro de la Entrepreno por Evoluigi la Specialan Ekonomian Zonon, kie nin atendis jam la gvidantoj de la organizo. Chen Chu Jie, ĝenerala vicdirektoro, Li Yi Zhong, vicestro de la Entreprenodirekta Ĉefsekcio kaj profesoro Cui Shao Jang, vicprezidanto de Huaming Electronic Industry Co. interesiĝis pri la spertoj de la hungara reformo en la ekonomidirektado kaj pri miaj esploroj en la japana Universitato Nanzan. La proksimeco kaj unike rapida evoluo de Japanio kompreneble vekas la interesiĝon de ĉinoj. Ankaŭ Hungario, ja ĝi estis la unua en la socialisma landaro, kie oni sukcesigis la ekonomian reformon (en la agrikulturo), kiun poste enkondukis

ankaŭ Ĉinio.

Poste la ĉinaj partneroj informis pri la ĉefaj rezultoj de la zono, pri la favoraj ekonomiaj kunlaboraj ebloj por la eksterlandaj entreprenoj. Mi eksciis, ke Shenzhen Special Economic Zone Development Co. rajtas okupiĝi pri io ajn (krom or- kaj armilmerkato), ili rajtas aĉetivendi varojn kaj servojn en la monda merkato. Estas eblo ankaŭ ekonomie kunlabori en la tria mondo. Estis menciite, ke pli frue hungaraj geofizikistoj rezulte kunlaboris en la malkovro de la plej granda naftokuŝejo de Ĉinio. La Sud-Ĉinia entrepreno pretas kunlabori kun hungaraj entreprenoj sur la plej diversaj kampoj.

Kiukolora la kato?

Dum la restado en Ĉinio mi havis la senton, ke mi estas en la tria mondo. Ĉi tie en Shenzhen mi tamen pensis, ke mi estas kvazaŭ en Japanio. Kaj tiel evidentiĝis, kiun koloron havas la kato. Antaŭ jaroj Teng Hsiao Ping - disputante kun la iama prezidanto Mao Zedong, kiu estis konvinkita pri la graveco de la klasbatalo - diris, ke la funkciigado de ekonomiaj organizaj rezultoj en kapitalismo estas bona ankaŭ por Ĉinio, se ĝi akcelas la evoluon de la lando. Teng diris jene: "Tutegale, ĉu la kato estas blanka aŭ nigra. Gravas nur, ke ĝi kaptu muson. "

Finalo en Mongolio

Post mia programo en Ĉinio mi revenis al Eŭropo tra dezerto Gobio kaj Mongolio. La trajno transpasis la limon noktomeze. La 1oĝantaro de Mongolio estas enorme maldensa - oni povas vojaĝi centojn da kilometroj sen vidi homon. En urboj, kun plurdekmil loĝantoj, oni ofte vidas rajdantojn.

Alveninte en Ulan Bator mi tuj iris al la buroo de Aeroflot en la strato Stalin por konfirmigi mian flugbileton. En la stacidomo ne estis taksioj, fine min kunveturigis per sia propra aŭtomobilo mongola familio. Tamen post duonhora vana atendado (neniu estis en la giĉeto) mi prefere iris ekhavi tranoktejon. En Ulan Bator funkcias kvin hoteloj, mi ricevis ĉambron sufiĉe malmultekoste (84 tugriko = ĉ. 340 Hungaraj forintoj).

Post la tropika varmo estis sufiĉe malagrabla la mongola vintro. Malgraŭ la frosto mi iris sekvatage promenadi tra la urbo. Mi devis iradi plurajn kilometrojn ĝis trovi vendejon. La varsortimento estis malriĉa. Pano, farunaĵo kaj sukero estis ĉie aĉeteblaj, por viando kaj lakto oni devas vicon stari. Fruktoj praktike nenie estis aĉeteblaj. Ĉe iu stratangulo mi vidis cent metrojn longan vicon, ĉiu homo kroĉis siajn manojn al la zono de la antaŭa por ke ne povu iu senrajte enigi. Ili atendis por vodko. Estis longaj vicoj ankaŭ ĉe la frizisto.

Reirinte en la hotelon mi renkontis mian malnovan hungaran konaton, laborantan delonge en Mongolio. Laŭ lia konsilo poste mi iris vidi la dinosauron en la Centra Stata Muzeo. Mi vizitis la lamaejon en la jurtokvartalo. 60-70 lamaoj ripetadis la malnovegan monotonan tekston. Laste mi volis eniri Bogdogegen-on, palacon de la lasta teokratia reĝanto, sed ĝi estis malfermita. Do, tiel sen vizito al la fama loko mi iris al la aerodromo kaj reflugis al Europo.

(Finita)

LA MALFERMIĜANTA ĈINIO

NOVAJ EBLOJ POR ORIENTA-OKCIDENTA KUNLABORO

Laŭ invito de la Sciencista-Teknikista Esperanto Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj la aŭtoro pasigis unu monaton en Pekino kaj sud-orienta Ĉinio. Jene li priskribas siajn spertojn el la vidpunkto de ekonomikisto.

……..

La Malproksim-Orienta defio

En mia antaŭa artikolo "Ĉu la miraklo imiteblas?" (Fokuso 88/1) mi traktis la eksterordinare rapidan evoluon de la Japana ekonomio. Tamen Japanio ne estas la sola lando de Malproksim-Oriento, kiu atingis mirindajn ekonomiajn sukeesojn. Kvar aliaj spuras ĝin: Hongkongo, Singapuro, Sud-Koreio kaj Tajvano (Okcidente oni lastatempe nomas ilin "la kvar tigroj", kaj en la Malproksim-Oriento -

"la kvar drakoj"). Laŭ multaj ekonomikistoj la salta evoluo de la Malproksim-Orientaj landoj kondukas al tio, ke la "pezocentro" de la monda komerco laŭgrade ŝoviĝos de Atlantiko al Pacifiko. En la lastaj jaroj ankaŭ Ĉinio pli kaj pli aliĝas al tiu procezo.

La evoluon de iu ajn lando premisas interalie ĝia intensa partopreno en la tutmonda scienc-teknika kunlaboro. Ne hazarde do plioftiĝis en Ĉinio la internaciaj sciencaj aranĝoj, kiuj donas pli kaj pli da novaj impulsoj por la modernigo de la lando. Inter tiuj elstaras la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE), celanta helpi, ke "*Ĉinio malfermu la fenestrojn al la mondo, kaj la mondo malfermu la fenestrojn al Ĉinio*". Tiujn vortojn mi citas el la parolo de la Ĉina vic-ministro pri telekomunikado, farita dum la inaŭguro de la 2-a IAKSTE. Tiun konferencon, okazintan en Pekino inter la 10a kaj16a de aŭgusto 1988, partoprenis pli ol 1200 fakuloj el 20 landoj.

La scienca konferenco

La strebo malfermiĝi al la mondo, la deziro lerni kaj sincere kunlabori karakterizas Ĉinion en la 1980-aj jaroj. La portreto de Maŭ Zedong, iam nomita "La Granda Stiristo" ankoraŭ videblas sur la Tjan-anmen-pordego en la centro de Pekino, sed la Maŭ Zedong-a izoliĝo jam tute finiĝis.

Laŭ la opinio de la Ĉinaj kolegoj la hororoj de la "kultura revolucio" neniam ripetiĝos. Tamen ĝiaj sekvoj eĉ hodiaŭ forte senteblas. Dum la "kultura revolucio" la supera edukado ĉesis, la universitataj iustruistoj devis transloĝiĝi al la kamparo kaj plenumi tie fizikan laboron. Praktike maleblis kontakti kun alilandanoj. Tial ne nur postrestis la scienco kaj tekniko de la lando, sed ankaŭ ne akumuliĝis spertoj pri rilatoj kun eksterlandaj fakuloj. Tio evidente malhelpis ankaŭ la organizadon de IAKSTE. La partoprenantoj malŝparis multe da tempo pro aranĝado dc vojaĝ-aferoj (ekzemple, tuta semajno ne sufiĉis al la organizantoj por validigi mian trajn-bileton por la reveturo, kaj finfine mi aranĝis la aferon en la staci-domo kun granda malfacilaĵo) kaj pro komunikad-problemoj (interalie, mi ne trovis publikan telefon-aparaton en la tuta ĉefurbo).

Malgraŭ ĉiuj organizaj malagrablaĵoj la 2a IAKSTE alportis gravajn sukcesojn kaj el scienca kaj el movada vidpunktoj. La organizantoj ricevis amason da preleg-proponoj kaj manuskriptoj en Esperanto. La organiza komitato de la konferenco meritas grandajn laŭdojn pro la fakto, ke la prezentitaj prelegoj estis informriĉaj kaj por la eksterlandaj kaj por la Ĉinaj fakuloj. (19 el tiuj prelegoj aperis en la periodaĵo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj n-ro 1988/3-4. Laŭ la enkondukaj vortoj de ĝia ĉefredaktoro, d-ro Shen Chenru, en la sekvontaj numeroj legeblos pliaj tekstoj elektitaj el la centoj da referaĵoj.)

La ĉeftemo de la nuna IAKSTE estis: "La reciproka efiko de la scienco-tekniko kaj socio". Krom la ĝeneralaj kunsidoj multaj referaĵoj estis pridiskutataj en la ses sekcioj de la konferenco: (1) matematiko, fiziko, kemio, astronomio, (2) tersciencoj, (3) teknikaj sciencoj, (4) medicino, biologio, (5) ekonomio, komerco, kaj (6) lingvistiko, edukado.

En la sekcio pri ekonomio aparte grandan interesiĝon vekis la prelego de Bai Jingchen, esploristo de la Monda Ekonomi-Politika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, pri la novaj tendencoj de la reformado en Sovetunio kaj la Orient-Eŭropaj landoj.

En la terscienca sekcio ĝeneralan kaj samtempe profundan trarigardon de la temo prezentis Gu Gongxu, prezidanto de la Ĉina Geofizika Asocio kaj honora prezidanto de la Geofizika Instituto sub la Ŝtata Sismologia Buroo. Lia prelego titoliĝis "Trovi pruvojn en terkrusta profundo por la tera scienco".

Saĝe decidis la organiza komitato, ke profesoro Christer Kiselman (Svedio) faru sian prelegon ne en sekcio, sed dum ĝenerala kunsido. Tiamaniere ĉiuj konferencanoj konatiĝis kun liaj pensovekaj tezoj pri la signifo de matematiko en la homa kulturo.

La kunsido de la medicina sekcio pruviĝis grava oportuno por kompari sciencajn atingojn de fakuloj el diversaj kulturoj kaj kontinentoj. La Eŭropaj kuracistoj informis pri siaj hodiaŭaj kurac-metodoj, dum Ĉina kuracisto konatigis la ĉeestantojn kun tradicia medicina praktiko baziĝanta sur la Tibeta mistikismo.

Kian koloron havas la kato?

Specialistoj pri Ĉinio bone memoras la tempon, kiam centmilionojn da homoj okupis la demando: "Kian koloron havas la kato?" Nome, prezidanto Maŭ Zedong akuzis siajn pragmatajn politikajn oponantojn - unuavice Deng Ŝjaŭping -, ke ili iras la kapitalisman vojon, klopodante revivigi en Ĉinio la merkaton, la financan stimuladon de la laboruloj kaj aliajn metodojn, pruvintajn siajn taŭgecon por pliefikigi la ekonomion tra la mondo.

"*Egalas, ĉu la kato estas blanka aŭ nigra*" - respondis Deng Ŝjaŭping. - "*Gravas, ke ĝi kaptu la muson*." Provizore venkis prezidanto Maŭ, asertante la plian gravecon de la klasbatalo. Tamen, vizitante Ĉinion, ĉiu ajn konvikiĝas, ke la definitiva venkinto iĝis Deng Ŝjaŭping: ĉie floras la komerco, abunde prosperas privataj vendejetoj kaj restoracietoj, viglas grandaj bazaroj, kreskas gigantaj konstruaĵoj.

Tiu ĉi fenomeno eĉ pli frapas la okulojn de la vojaĝanto en sud-orienta Ĉinio. Laŭ iniciato de Deng Ŝjaŭping oni aparte kuraĝigas establi komunajn entreprenojn de Ĉinaj kaj eksterlandaj firmaoj, krome oni ebligis pli liberan cirkuladon de kapitalo kaj laborforto. Importante funkciantan kapitalon kaj adaptante evoluintajn eksterlandajn teknologiojn, ĉi tie la Ĉinoj rapide modernigas sian ekonomion. Mi povis persone konatiĝi kun ĉio ĉi: post la konferenco mi vizitis tiun regionon, akceptinte la afablan inviton de la Kantona Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA) kaj de Fang Huiping, profesoro de la Universitato Ĵinan.

La malfermitecon de Ĉinio bone karakterizas la fakto, ke hodiaŭ eksterlandanoj rajtas libere loĝi ĉe Ĉinaj amikoj kaj kolegoj. Utiligante tiun eblon, en Kantono mi tranoktadis en la loĝejo de d-ro Ke Shi De, katedrestro pri scienca esplorado ĉe la Universitato Ĵinan. (En la komforta loĝejo, konsistanta el tri ĉambroj, kuirejo kaj banejo li vivas kun edzino kaj filino.)

Vojoj al la pinto de la Fuĵi-monto

Sude de Kantono, ĉe la limo kun Hongkongo situas la speciala

ekonomia distrikto de Ŝenĝeno. Por eniri tiun ĉi zonon eĉ Ĉinoj bezonas apartan permesilon. Min akompanis unu el la gvidantoj de la Kantona STEA, Liu Wei Zhang, kaj en la stacidomo de Ŝenĝeno nin atendis unu el la estroj de la Entrepreno por Evoluigi la Ŝenĝenan Specialan Ekonomian Distrikton, Du Shou He, kaj la direktoro de la firmao Espero Enterprises, Lee Teck Shiu, ku tiumatene alveturis el Hongkongo.

Alveninte el la interno de Ĉinio, oni sentas sin kvazaŭ en alia mondo. Antaŭ kelkaj jaroj mi studis en Japana universitato, kaj nun ŝajnis al mi kvazaŭ mi denove estus en Japanio. La varoj en la vendejoj pli abundas kaj la salajroj pli altas ol en aliaj regionoj de Ĉinio. Kiel mi tamen konstatis, la diferenco montriĝas ne nur en la vivnivelo, sed ankaŭ en la pensmaniero de la tieaj loĝantoj.

Tion ekzemplas ankaŭ la ekonomiaj kaj politikaj grupoj, ligitaj al la supre menciita entrepreno por la evoluigo de la Ŝenĝena distrikto. Ili kapablas krei prosperan modernan ekonomion sur la loko de la antaŭa mizera kamparana vivo. La entrepreno jam produktas kaj eksportas altkvalitajn varojn de la nutraĵa, tekstila, kemia, aluminia, maŝina kaj elektronika industrioj. La entuziasmaj gvidantoj de la entrepreno, prezidanto Yuan Tao Ren kaj ĉef-inĝeniero Du Shou He faras ĉion eblan por plilarĝigi kaj plifirmigi reciprokan ekonomian kunlaboron kun alilandaj entreprenoj ankaŭ helpe de Esperanto.

Rigardante la ĉielskrapantojn de tiu speciala ekonomia diskrikto, ŝajnis al mi, ke la optimismo de ĝiaj loĝantoj havas realan fundamenton. Sekvante "la kvar tigrojn", ankaŭ tiu ĉi lando, la hejmo de kvinono de la homaro, transformiĝos en evoluintan industrian socion. La tiucelaj metodoj en Ĉinio parte diferencas de tiuj aplikataj en la nove industriiĝintaj etaj landoj. Ili malsamas ankaŭ en Japanio, en Eŭropo kaj la ceteraj mondopartoj. Tamen la celoj samas. Laŭ Japana proverbo: "Multaj vojoj kondukas al la pinto de la Fuĵi-monto, sed ĝi havas nur unu pinton."

世界语用于经贸领域

《焦点》1988年第3期上刊登了高·马尔库什博士的一篇非常有趣的文章，题为《东西方合作的新的可能性》（第52～55页），谈的是他访问中国深圳特区发展公司的事。其中写道：热情的公司经理袁陶仁、总工程师杜寿河正尽一切努力通过世界语扩大和加强同其他国家企业的相互经济合作。

然而，截至目前为止，我还没看到有一本世界语杂志刊登有关为实现这一目标所作的活动计划。其原因何在？

我不是这方面的专家，但我认为应该尝试一下。因为公司对世界语的理想从来不感兴趣。下面就是我对这种活动方案的一些粗略设想：

（1）按照国家和经济部门的情况，对有世界语者在那里工作的企业和公司进行登记。这些世界语者有能力在职业上用世界语处理各种关系。

（2）把这个定期进行登记的公司、企业名单散发给各公司、企业。建议他们为公司职员举办世界语速成班。

（3）当然，这些教员应该得到报酬，但他们必须是能胜任这项工作的。其中一点就是他们十分熟悉与公司和企业有关的最新术语，而不是仅仅关注属于俱乐部活动范围的基础教学。

（4）应该照顾从事这项编辑工作小组，使他们能随意使用计算机。在它开始工作时，它要定期同国际世协的新术语中心进行联系。因为世界语术语在一些领域里还不够完善。

（5）人们还可以预期出版一本有这些公司通讯处的“贸易——工业年鉴”。这笔费用可用他们的广告费来顶替。

如果我不是在夸夸其谈的话，那么谁去努力实现它呢？

戈·皮尔劳特（比利时）

1989年1月22日

（晓安译）

ESPERANTO EN KOMERCAJ KAJ EKONOMIAJ MEDIOJ

En FOKUSO (n 7-88/3) estas tre interesa artikolo de D-ro Gabor Markus titolita "*Novaj ebloj por orienta-okcidenta kunlaboro*" (p. 52-55). Parolante pri la speciala ekonomia distrikto de Shenzhen, Ĉinio, kie li vizitis "Shenzhen Special Economic Zone Development Company", li i.a. skribas: "La entuziasmaj gvidantoj de la entrepreno, prezidanto Yuan Tao Ren kaj ĉef-inĝeniero Du Shou He faras ĉion eblan por prilarĝigi kaj plifirmigi reciprokan ekonomian kunlaboron kun alilandaj entreprenoj ankaŭ helpe de Esperanto".

Ĝis nun mi nenie legis en la E-gazetaro pri agadplano por realigi tian praktikan celon! Kial?

Mi neniel estaspertulo, sed ŝajnas al mi, ke endus provi ion. Ĉar firmao neniam interesiĝos pri Eo pro idealo, jen skizo de agadplano:

1. Listigi, laŭ landoj kaj ekonomikaj sektoroj, firmaojn kaj entreprenojn, kie laboras kompetenta(j) E-isto(j) kiu(j) kapablus profesie prizorgi rilatojn per Eo.

2. Dissendi tiun liston, kiu estu regule ĝisdatigita, al firmaoj, proponante rapidkurson pri Eo por oficistoj de tiuj firmaoj.

3) Kompreneble, tiuj instruantoj estu pagotaj, sed ili estu tre kompetentaj I.a. ili estu BONEGE informitaj pri la plej freŝdata terminologio kiu rilatas al la celita firmao/entrepreno; ne plu temas pri elementa instruado sufiĉa por klubagado.

4) Devus prizorgi tiun kompiladon grupeto, kiu disponas pri komputilo; krome ĝi estu en regula kontakto kun la nova Terminologia Centro de UEA, kiam ĝi funkcios!? - ĉar la E-terminologio estas nekompleta en pluraj sektoroj.

5) Eĉ oni povas antaŭvidi eldonon de "Komerc-industria jarlibro" kiu enhavu tiujn adresojn kaj kiu estu pagita per reklamoj de menciitaj firmaoj.

Se mia sugesto ne estas tro utopia, kiu klopodus realigi ĝin?

22. 01. 1989

Germain PIRLOT

Residertie "Vaughan" Kemmelbergstr. 5 B.3

B. 8400 OOSTENDE Belgio

BEHÄRSKAR SEX UTLÄNDSKA SPRÅK

"Esperanto bättre än de fem andra!"

- Av LARS MADEBRINK -

Gabor Markus år professor och doktor i ekonomi i Ungern och Japan. Förutom sitt modersmål ungerska behärskar han sex språk - engelska, esperanto, franska, japanska, tyska och ryska.

- Esperanton har jag mer nytta av än de fem andra språken tillsammans. För esperanto är mer än ett språk, sade han under sitt karlskogabesök som avslutades på onsdagen.

1972 blev han professor i ekonomi i Budapest. Ett intressant land för en ekonom är Japan, med sin stora tillväxt.

1981 åkte han dit som turist. I stället för att fIyga tog han tåget, via transsibiriska järnvägen. Efter två veckor var han framme och under den perioden hade han hunnit lära sig esperanto.

- Jag hade en instruktionsbok med mig på tåget och var klar med den vid framkomsten. Jag var visserligen nybörjare, men kunde göra mig förstådd bland japaner som pratade esperanto.

Doktor

1982 återvände han till Japan, den här gången för att studera. 1984 utsågs han till doktor i ekonomi och matematik.

- Det var ett par jobbiga år. På morgnarna fick jag instruktioner på japanska. På eftermiddagarna var det föreläsningar på engelska. Och pá kvällarna besökte jag ofta den' lokala esperantoklubben.

- Det är inte lätt att växla mellan tre olika språk dag ut och dag in. Speciellt som inget av dem var mitt modersmål ungerska.

Välkländ

Gabor Marku's intresse för esperanto bara växte och växte. I dag är han mycket känd i de här kretsarna och har deltagit i flera av

världsorganisationens kongresser. Dessutom är han redaktör för en vetenskaplig tidskrift på esperanto.

- Esperanto är inte bara ett språk utan även en ideologi. Vi vill verka för fred i världen. Ett bra sätt att uppnå det år att folk kan kommunicera med varsandra. Vi är alla br0der och systrar, som inte behöver vara oense utan kan leva i fred.

- Esperanto kan användas på många sätt. Förra året var jag på en vetenskaplig konferens i Kina. 1 200 personer från 20 länder deltog. Det gemensamma språket var esperanto

- Anledningen är att det är lätt att lära sig. Det tar 200 timmar att lära sig esperanto, 2 000 timmar att läsa in engelska och drygt 5 000 timmar att behärska japanska och kinesiska

Universitet

- Kinas regering har planer på att starta ett universitet, där det skall undervisas på esperanto. På så sätt kan de lättare hjälpa länderna i tredje världen.

- En student från Afrika eller Sydamerika lär sig esperanto på två månader och kan sedan börja med sina speciella ämnen. Om han eller hon först skall läsa in kinesiska, dröjer det två år innan de egentliga studierna kan komma igång.

-I östeuropa har vi många studenter från tredje världen. Låt oss säga att fyra studenter från Tanzania studerar ekonomi - en i Rumanien, en i Tjeckoslovakien, en i Ungern och en i Östtyskland.

-När de efter fem år är klara och kommer hem så kan de inte diskutera de ekonomiska termerna med varandra. För de har ju lärt sig dem på fyra olika språk.

- Och tänk vad mycket lättare allt' skulle vara i organisationer som FN och Unesco om alla pratade esperanto. Nu måste alla dokument översättas till de officieIla språken, vilket kostar både tid och pengar.

- Jag hoppas att esperanto skall sprida sig över hela världen. Då skulle allt bli lättare och alla skulle förstå varandra.

Karlskoga

„Gabor Markus reser just nu runt i Sverige på inbjudan av den svenska esperantoorganisationen. I söndags kom han till Karlskoga och i onsdags reste han vidare.

Han höll flera föreläsningar på Karlskoga folkhögskola. Dels informerade han samtliga elever om esperanto, dels deltog han i esperantokursens lektioner.'

FOTNOT: **Tanken med esperanto är inte att ersätta andra språk, utan att det skall vara „allas andra språk". På så sätt bevaras språk och kulturer. Språket grundades av polacken Ludwig Zamenhof.**

…….

Efter 40 år

NU ÄR PROFIT INTE ETT FULT ORD…

- Av LARS MADEBRINK -

Gabor Markus är professor i ekonomi i Ungern. Därmed har han bättre insyn än många andra i de förändringar som pågår i landet.

- **I 40 år har profit varit ett fult ord, men så är det inte längre.**

1956 rullade de sovjetiska tanksen in över Ungerns gränser. Ungrarnas frihetssträvanden hade gått för långt, enligt Moskva.

Sedan dess har Ungern sakta men säkert manövrerat sig tillbaka mot friheten. I dag, menar Gabor Markus, är hans land det friaste av alla östeuropeiska länder.

Nya partier

- Tidigare ägdes alla företag av staten, men det håller vi på att ·ändra. Marknadskrafterna spelar en större roll, liksom kontakterna med världsmarknaden.

- För tio dagar sedan, samma dag som jag reste till Sverige, rapporterade tidningarna om att det nu får bildas nya partier. .

- Regeringen och kommunistpartiet har också fått en annan inställning till vad som hände 1956. Tidigare benämndes det som en kontrarevolution, men det ordet används inte längre.

Middag

- Våra gäster är lika öppna som västländernas. Ungrare åker exempelvis till Österrike för att handla. Och österrikare kommer till Ungern, ibland på korta besök för att äta middag eftersom det är så billigt.

- Svenskar behöver inte längre visum för att resa in i Ungern. Det går allt snabbare mot ännu större frihet. En utveckling som jag hoppas skall hålla i sig.

La kastelo en Nagoya, kie la aŭtoro studis en Nanzan Universitato

Japana belulino kun floroj

헝가리와 서길수 교수

가보르 마르쿠스 박사(헝가리)

내가 서길수 교수의 사상을 알게 된 것은 지난 세기 1980년대 전반이었다. 그 때 나는 일본 남부 도시 나고야에 있는 난잔 대학에서 박사학위 과정을 밟고 있었다. 나고야에서 나는 다양한 사회 조직과 일본 에스페란토 운동에 참여할 수 있었으며, 우리는 사회과학과 경제학 문제에 관한 토론을 자주 가졌다. 그 때 국제 학술대회에 한국인들이 참여하였는데, 처음으로 함께 참석한 서길수 교수의 고상한 사상에 관해 들었다.

나는 그 후 1990년에 서길수 씨를 개인적으로도 만날 수 있었으며, 유럽 여행

